

BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

En la numero:

RIGARDO
AL LA XXI
JARCENTO

•

AMATORA
ARTO FESTAS

•

PORPACA
KUNLABORO

•

NIAJ
VETERANOJ

•

TURISTA
SIMPOZIO

•

PACA
FORUMO


•

VERDAJ
STELETOJ



JARO 55 • N-RO 4 • JUNIO • 86

FESTO DE NIA AMATORA ARTO



Flugu, nia Esperanto-kanto!...

Fotoj: Pavel Gančev

Cefurbo de la XIX Nacia Revuo de E-Parolo kaj Kanto ĉi-jare estis la distrikta urbo Razgrad. Tre bela estas la verda sezono ankaŭ en tiu pitoreska regiono nomata „grenejo de Bulgario“, kie kunvenis pli ol 800 gejunuloj por partopreni la tradician ĉiujaran feston de nia amatora arto.

Unue ni devas konfesi, ke la tuta programo en la du revuaj tagoj — 31-a de marto kaj 1-a de aprilo, kiun ni ŝuldis al la dommastroj, estis riĉenhava kaj interesa. Krom la tradiciaj gazetara konferenco kaj meto de krono ĉe la Frata Tombejo — estis organizitaj ankaŭ aliaj aranĝoj.

Speciale por la Revuo la Kulturdomo ĉe DE de BEA en Razgrad, kune kun la komunuma centro „Standardo de la paco“, anticipe anoncis tutlandan konkurson pri temo „Por paco sur la Tero“ kaj kolektis proksimume 600 infanajn pentraĵojn. Al la gajnintoj en la konkurso, el kies pentraĵoj oni aranĝis ekspozicion, estis enmanigitaj premioj ne nur de la organizantoj, sed ankaŭ en la nomo de aliaj distrik-taj organizaĵoj.

La partoprenintoj en la Interkona Vespere ne nur interkonatiĝis, sed en daŭro de du horoj ĝuis varian kaj altnivelan koncerton. Dum la konkursa tago je dispono de la partoprenintoj estis aŭtobusoj, per kiuj personoj ne ankoraŭ, aŭ ne plu engaĝitaj en la programo vizitis la romian arĥeologian rezervejon „Abritus kaj la etnografian ensemblon en vilaĝo Topĉii.

La revuo estis solene inaŭgurita en la salono de la Distrikta Komitato de BKP. Krom la partoprenantoj, tie ĉeestis ankaŭ iliaj gvidantoj kaj la organizantoj el la Junulara Sekcio de BEA kaj el DE de BEA en Razgrad,

la vicprezidanto de CE de BEA ing. Petăr Todorov, la vicprezidanto de la Distrikta Popola Konsilantaro Gančo Dobrev kaj la prezidanto de DE de BEA — d-ro Ivan Kirčev. En la nomo de la partoprenantoj en la XIX Nacia Revuo de E-Parolo kaj Kanto estis sendita telegramo al la delegitoj de la XIII kongreso de BKP.

LA KONKURSA PROGRAMON

partoprenis reprezentantoj de 23 distriktoj. Nun, kiam jam trankviliĝis la spiritoj, oni devas objekte pritaksi la artan kaj lingvan nivelon de la plenumantoj, ne forgesante la celojn de la revuo: helpi al infanoj kaj gejunuloj praktiki kaj perfektigi la lingvon, trovi amikojn inter siaj samaĝuloj el ĉiuj anguloj de nia patrolando; ebligi al la junaj adeptoj de nia lingvo sursceneje sin prezenti kaj jam de la junaĝo altiri ilin al la E-movado. Ĉu la ĉi-jara revuo respondis al tiuj celoj?

Dum la festivalo ni multe parolis pri ĝiaj bonaj flankoj kaj pro tio mi nur mencias ilin, ĉar estos pli utile preparoli la problemojn. Ĝenerale la revuo estis vera festo de la bulgara E-junularo en la amatora arto. Ni vidis strebadon al pli originala individua traktado de la verkoj, pli moderne proponitajn deklamaĵojn.

La grava problemo restas la lingva nivelo de la partoprenantoj. Iuj el ili ne nur ne posedas Esperanton, sed eĉ ne lernas ĝin. Ili simple parkeris la tekston sen kompreni ĝin. Simila rilato al la teksto evidente malebligas al la deklamantoj elmontri sian talenton.

La granda nombro da partoprenantoj sen la necesaj kvalitoj estas la dua problemo. Ja por forigi la nesufiĉe spertajn kandidatojn ekzistas la distrik-taj konkursoj, antaŭantaj la nacian revuon. Ĝis kiam ni zorgos precipe pri la kvanto anstataŭ pri la kvalito?

Kaj trie, oni ne devas forgesi, ke ĉi tiun revuon oni organizas por la junularo. Ĉi-jare ekster la konkurso partoprenis ankaŭ plenumantoj pli ol 35-jarojn aĝaj kaj dum la sola konkursa tago estis perdita valora tempo. Ja plenaĝuloj havas la eblecon sin prezenti en la Botev- kaj Vapcarov-festivaloj.

Per tiuj rimarkigoj mi ĝeneraligis la opiniojn de la ĵurioj, sed mi donas la parolon ankaŭ al la ĵuriaj prezidantinoj:

Belka Beleva — prezidantino de la ĵurio por IV kaj V grupoj:

— Mi ne partoprenis la ĵurian laboron de tiu tradicia revuo jam tri jarojn. Dum la ĉi-jara festivalo mi kun plezuro rimarkis, ke la konkursa programo — originala kaj traduka — estis tre varia kaj ampleksis la verkaron de bulgaraj kaj eksterlandaj aŭtoroj. La temoj

(Sekvas sur paĝo 3)



RIGARDO AL XXI JARCENTO

(El la Ferma parolado de Todor Jivkov,
Ĝenerala Sekretario de CK de BKP)



Jam finis sian laboron la XIII kongreso de Bulgara Komunista Partio.

Kion plej ĝenerale oni povas diri pri ĝi?

Unue. La kongreso konkretigis kaj pliriĉigis la Partian programon en la novaj kondiĉoj de la enlanda kaj internacia situacio; ĝi desegnis la vojon kaj metis la taskojn, kiuj garantios la pluan konstruadon kaj pliperfektigadon de la socialisma socio en Popola Respubliko Bulgario ĝis la fino de nia jarcento.

Due. La kongresaj decidoj levas la Lenin'an ĝeneralan aprilan linion al kvalite nova ni-

velo, por ke nia patrolando povu evolui pli intense kaj marŝi tuj post la plej progresintaj socialismaj landoj dum la konstruado kaj florado de la socialisma civilizacio.

Trie. Nia kongreso estas impete direktita al la estonto. Per la ŝanĝoj, kiujn ni nun realigas kaj en la bazo, kaj en la superstrukturo, ni kreas la necesajn premisojn, por ke Bulgario estigu alte evoluinta socialisma ŝtato, kapabla respondi al la postuloj de la XXI jarcento. En la centro de la kongresa laboro staris la problemoj de realigo de la scienc-teknika-revolucio en nia lando.

Kun profunda kontenteco ni povas diri: la preteco de la partio ĉefi tiun gravegan laboron elmontrigis en la krea laboro de nia popolo post la XII kongreso kaj precipe post la Februara plenkunsido de CK de BKP. Ĝi estis konvinke manifestita ankaŭ tie ĉi, dum la laboro de XIII kongreso.

Tio montras, ke ni iras laŭ la ĝusta vojo, kun kredo pri nia sukceso.

Tiu ĉi kredo estas reala, ĉar la komunistoj, nia bonega junularo, la bulgara popolo kapablas realigi la faron, kiun ni entreprenis. Ĝi estas reala, ĉar ni partoprenas kaj ĉiam pli aktive partoprenos en la specialigo kaj integro kun la frataj socialismaj landoj. Ĝi estas reala, ĉar ni apogas nin sur la grandegaj ebloj, kiujn malkovras antaŭ ni la kurso de kunlaborado kaj ĉiufanka proksimiĝo de PR Bulgario kun Sovetunio.

Dum la lastaj jaroj ni tre serioze akcentas sur la problemoj de la scienc-teknika revolucio, parolas pri teknologioj, pri struktura politiko, pri ekonomia meĥanismo.

Historia merito de la kreintoj de nia instruado estas ke ili venis al la konkludo kaj pruvis, ke decida por la homa evoluo, por la evoluo de nia sociordo estas la ekonomio, ĝia progreso. Tial, plenumante la decidojn de la nuna kongreso, plimultigante la materialajn riĉaĵojn de nia lando, ni kreas ĉiam pli bonajn kondiĉojn por nia nacio vivi kaj krei, disvolvi siajn fortojn kaj kapablojn.

Samtempe, per nia kompleta ĝisnuna laboro kaj per la decidoj de la kongreso ni levas sur novan, pli altan ŝtupon la socialisman demokratismen. Kaj ne nur per bondeziroj, sed per politikaj, ekonomiaj kaj juraj garantioj.

Tio estas la nova laborkodo — la laborkonstitucio de Bulgario, kiu aranĝas la bazajn laborproblemojn kaj laborinterrilatojn kaj legigas la rolon de la laborkolektivo kiel mastro de la socialisma proprietaĵo.

En la nomo de la homo la kongreso prezentis laŭ nova maniero la problemojn de la sociala politiko. En la socialisma socio la kompleksa kontentigo de la materialaj, spiritalaj kaj socialaj bezonoj de la popolo devas realigi konforme al la kresko de ĝia aĉetpovo.

La sociala politiko akceptita de la XIII kongreso, tute ne elĉerpiĝas per la materialaj bezonoj de la laborhomoj. Ĝi dependas de la ideo-politika kaj kultura elkresko de nia junularo, de nia popolo, de la batalo por pliriĉigo kaj kontentigo de la spiritalaj bezonoj de la homoj.

Por ni, por la Bulgara Komunista Partio, ne ekzistas pli granda valorajo ol la homo. La zorgo pri la homo trafenbras la tutan laboron ankaŭ de la nuna kongreso. Evoluo de la personeco ĉe la socialismo, estimo de la homa digno, formado de kamaradecaj interrilatoj, konfirmo de la socialisma vivmaniero ankaŭ estonte estos la kerno de nia politiko.

Ni bone konscias, ke plenumante la taskojn, starigitajn de la kongreso, ni neeviteble kunpuŝigos kun multaj malfacilaĵoj. Mi havas antaŭvide malfacilaĵojn ligitajn antaŭ ĉio kun la komplika karaktero de la taskoj. La scienc-teknika revolucio ne solvos aŭtomate niajn taskojn. La kreado de niaj kaj la transportado de fremdaj sciencaj produktoj kaj ilia praktika aplikado postulas batalon, obstinecon, firmecon.

Ni devas rigardi realisme al la aferoj. Kvantam ni prilaboris modernan scienc-teknikan strategion, ni devas klare kompreni: ni ne povos jam morgaŭ ĉie kaj komplete enkonduki modernajn teknikon kaj teknologion.

Nia lando disponas pri grandega taĉmento de spertaj, honestaj kaj sindonaj kadroj, kiuj scipovas priatenti la opinion de la laboruloj, apogas sin sur ili, ĝuas ilian konfidon. Guste tiuj kadroj donos la direkton, ĝuste ili organizos la plenumon de la kongresaj decidoj.

Nun ni bezonas praktikajn agojn. Ni bezonas ordon, disciplinon kaj organizitecon. Ni bezonas laboron — celdirektitan, grandegan laŭ vasteco, skalo kaj rezultiveco.

Ni volas malkaŝe diri al ĉiuj: de la direkto aprobita de la kongreso ni ne povas rezigni kaj ne rezignos, ni konsekvence kaj firme realigos ĝin! Ĉar por socialisma Bulgario alia vojo al la estonto ne ekzistas.

Kaj ni firme kredas, ke la civitanoj de nia lando akceptas kiel siaj propraj la kongresajn projektojn kaj per ĉiuj siaj fortoj kaj energio batalos por ties realigo.

Permesu al mi denove esprimi mian plej sinceran dankon al la laborista klaso, al la agrikulturistoj kaj al la popola inteligentularo, al la tuta bulgara laborpopolo pro la apogo, pro ĉio farita ĝis nun.

Ni bondeziru al ni novajn sukcesojn en la konstruado de evoluinta socialisma socio en Popola Respubliko Bulgario.

KONSULTIGO DE SLEO-J'86

(komuniko)

En Poprad, Ĉeĥoslovakio, de la 20-a ĝis la 26-a de aprilo 1986 kunvenis reprezentantoj de E-organizaĵoj el Bulgario, Ĉeĥoslovakio, Germana Demokratia Respubliko, Hungario, Pollando, Sovetunio kaj Vjetnamio. Oni pridiskutis la aktualan mondsituaĉion kaj unuanime esprimis decidan subtenon al la propono de Sovetunio pri lomp-stop-loma likvido de la nukleaj armiloj ĝis la fino de la 20-a jarcento.

La kunvenintoj reprezentantoj rekomendis al ĉiuj SLEO-J konigi al la monda esperantistaro sian firman volon kunlabori kun diverstendencaj esperantistoj por konservo de la monda paco, kontraŭ militarismo de la kosma spaco.

La kunvenintoj alvokas al plibonigo kaj pliakivigo de la laboro por apliko de Esperanto en profesiaj kaj sciencaj rondoj.

La Konsultigo proponas al SLEO-J kaj al ĉiuj esperantistoj organizi solenaĵojn lige kun la centjara jubileo de Esperanto, utiligante tiucele ankaŭ la Rezolucion de UNESKO 1985.

La 100-jara jubileo devus helpi al SLEO-J en la varbado de novaj adeptoj de Esperanto, por kreskigo de la membraro de E-asocioj, precipe el junularaj medioj.

La kunvenintoj esprimas sian firman konvinkon, ke la venontjara jubilea UK en Varsovio fariĝos brila manifestacio de la unueco kaj pacamo de la monda esperantistaro.

La partoprenantoj esprimas sian dankon al SEA pro la kreo de bonegaj laborkondiĉoj de la Konsultigo.

Poprad,
la 26-an de aprilo 1986

Partoprenantoj en la 19-a
Konsultigo de SLEO-J

FESTO DE NIA AMATORA ARTO



La plej juna plenumanto Ivan Paraŝkevoj el Jambol, gajninto de unua premio.

(daŭrigo de p. II)

estis tre konvenaj: glora historio de nia popolo, heroa vojo de BKP, paco sur nia planedo. La plimulto de la partoprenantoj kaj iliaj gvidantoj elektis verkojn konvenajn por la kvalitoj de la deklamantoj — tembro kaj temperamento. La kostumoj estis bone elektitaj, ofte kun Esperanto-elemento: verda kravato, insigno ktp.

Sed multaj el la partoprenantoj ne sufiĉe bone posedas la lingvon. Oni devas lerni Esperanton! Pri la arta plenumo mi denove diras, ke la plenumantoj, dum la periodo de sin-

preparado por la revuo, devas serĉi la helpon de la specialistoj el la distriktaj centroj pri amatora arto. Tiurilate povas helpi ankaŭ la aktoroj el la Bulgara Esperanto-Teatro. Dum la festivalo estis multaj plenumoj kun akompano de magnetofonaj surbendigoj. Sed tiuj akompanoj ne helpis al la deklamantoj, ne pliriĉigis la etoson dum la recitado, eĉ male.

Krome, ni denove devas reveni al la oratoria konkurso, ĉar per ĝi oni atingas veran art-nivelon. Mi mencias ankoraŭ, ke ni bezonas pliriĉigon de la kantrepertuaro.

Kaj fine mi dezirus atentigi la partoprenantojn kaj iliajn gvidantojn pri alia momento: antaŭ kaj post siaj plenumoj la gejunuloj en la salono bruis, malhelpis serioze al la ĵurio labori normale. Tio signifas ne nur malestimon al la plenumantoj, kiuj tiumomente estas sur la scenejo, kaj nesufiĉe altan kulturon de sinteno en simila forumo. Tio signifas ankaŭ mankon de intereso al tio, kio okazas sur la scenejo, al la lingvo mem. Ja tiuj festivaloj estas oportuna momento por ellerni vortojn, por observi la plenumojn de aliuloj kaj ĝuste pritaksi sian propran artan kaj lingvan nivelon kompare kun ilil.

Libertaria MLADENOVA — prezidantino de la ĵurio por I, II kaj III grupoj:

— Al la vortoj de mia koleginino mi aldonos nur tion, ke la gvidantoj devas pli bone pripensi la muntaĵojn. En la konkursa programo abundis popolkantoj kaj popolstilaj kostumoj. Estas bone ke la bulgara folkloro trovas sian lokon dum la festivalo, sed ĝi tamen ne devas superregi.

La festivalo estis fermita en la dramteatro „Anton Straŝimirov“ per koncerto de la partoprenantoj. Tiu koncerto ankoraŭfoje montris, malgraŭ la jam menciitaj malperfektaĵoj, la bonajn eblecojn de nia Esperanto-junularo en la amatora arto.

Maria BOJAĜIEVA

LISTO DE LA PREMIITOJ

en la XIX Nacia Revuo de E-Parolo kaj Kanto en Razgrad, 1986

I GRUPO — ĝis 6-jara aĝo

Individuaj plenumoj

Por kanto: I premio — Ivan Paraŝkevoj — Jambol
II premio — Duet: Maja Toškova kaj Greta Ivanova — Targoviŝte

III premion oni ne aljuĝis

Por recitado:

I premio — Neli Dejanova — Razgrad
II premio — Ivelina Lefterova — Silistra
III premio — Nikolina Takeva — Cepelare

II GRUPO — de 7- ĝis 10-jara aĝo

Individuaj plenumoj

Speciala premio por propra verko — Radinka Vitanova — Botevgrad

Por kanto: I premion oni ne aljuĝis

II premio — Zornica Kirova — Gorna Orjanovica

III premion oni ne aljuĝis

Por recitado:

Speciala premio estis aljuĝita al Ĥristo Marinov — Botevgrad

I premio — Iljana Petkova — Stara Zagora

II premion oni ne aljuĝis

III premio — Nikolina Panĉeva — Cepelare

Du kuraĝigaj premioj: Sofia Angelova — Haskovo

Mariana Slavova — Jambol

Kolektivaj plenumoj

Por recitado:

I premio — junpionira grupo — Varna

II premio — junpionira grupo — Bankja

III premio — junpionira grupo — Svoge
 Por teatraĵo:
 I premion oni ne aljuĝis
 II premio — junpioniroj el Veliko Târnovo
 III premion oni ne aljuĝis
 Por grupa kantado:
 I premio — kantgrupo el Razgrad
 II premion oni ne aljuĝis
 III premio — kantgrupo el Veli-
 ko Târnovo

III GRUPO — de 1- ĝis 14-jara aĝo

Individuaj plenumoj

Por kanto: I premio — Albena Sankova — Dimitrov-
 grad
 II premio — Galina Petkova — Sumen
 III premion oni ne aljuĝis
 Kuraĝiga premio: knabina trio — Ĥaskovo
 Por recitado:
 I premio — Aneta Angelova — Jambol
 II premio — Gergana Petrova — Godeĉ
 III premio — Donka Veleva — Ĥaskovo
 Kuraĝiga premio: Mihaela Januŝeva —
 Ĉepelare

Kolektivaj plenumoj

Por recitado:
 I premio — junpioniroj el Bojuriŝte
 II premio — junpioniroj el Gâlâbovo
 III premio — junpionira grupo — lernejo
 „Standardo de la paco“ — Sofio
 Por muzika sceneja spektaklo:
 I premion oni ne aljuĝis
 II premio — grupo el Plovdiv
 III premio — junpioniroj el Madan
 Por teatraĵo:
 I premion oni ne aljuĝis
 II premio — trupo el Sumen
 III premio — trupo el Senovo
 Por folkloro spektaklo:
 Speciala premio: junpioniroj el Botev-
 grad
 I premio — junpioniroj el Gabrovo (por
 la folklorajo „Lazaruvane“)
 II premio — junpioniroj el Ĥaskovo (por
 la folklorajo „Koleduvane“)
 III premio — junpioniroj el Ĥaskovo
 (por la folklorajo „Lazaruvane“)
 Por grupa kantado:
 I premio — kantgrupo el Gabrovo
 II premion oni ne aljuĝis
 III premio — junpioniroj el Dimitrov-
 grad

IV GRUPO — de 14-ĝis 18-jara aĝo

Individuaj plenumoj

Por kanto: I kaj II premion oni ne aljuĝis
 III premio — Kalinka Stojanova — Raz-
 grad

Kuraĝigaj premioj: Rumjana Dimitrova —
 Sliven
 Katja Ĥristakieva — v. Tenevo
 (distrikto de Jambol)

Por recitado:

I premio — Daniela Kirilova — Ĥaskovo
 II premio — Emilija Miteva — Sofio
 III premio — Konstantin Pavlov — Sofio
 Kuraĝigaj premioj: Mariana Ŝarlangieva —
 Godeĉ
 Donka Barâмова —
 Sliven
 Milena Janeva — Jam-
 bol
 Por propra verko — Raja Stoiĉkova —
 Ihtiman

Kolektivaj plenumoj

Por muntaĵo: I premio — Klubo „Amikeco“ — Sofio
 II premio — Klubo ĉe la Kulturdomo —
 Razgrad
 III premio — E-grupo — Târgoviŝte
 Por poezia miniaturo: Târgoviŝte
 Kuraĝigaj premioj: E-grupo — Ĥaskovo
 E-grupo „Fervojisto“ —
 Stara Zagora

Por grupa kantado:

I premio — VIII lernejo — Sofio
 — Grupo por politikaj kantoj —
 Razgrad
 II premio — Grupo „Ruĝaj fajreroj“ —
 Jambol
 III premio — Ĥoro de knaboj — Raz-
 grad
 Kuraĝigaj premioj: Kantgrupo — Kubrat
 Kantgrupo — Ĥaskovo
 „Ruĝa papavo“ — Ihti-
 man

V GRUPO — de 18-ĝis 35-jara aĝo

Individuaj plenumoj

Por kanto: Speciala premio — Penka Miĥneva —
 Gorna Orjaĥovica
 (el la folkloro ensemblo „Sider vojvoda“)
 Por recitado:
 I premio — Zdravka Bogdanova —
 Plovdiv
 II premio — Cvetanka Lozanova —
 Godeĉ
 III premio — Emil Atanasov — Sofio
 Kuraĝigaj premioj: Janka Atanasova —
 Gabrovo
 Penka Taslakova —
 Loveĉ
 Maria Ĝambazova —
 Dolna Banja
 (Distrikto de Sofio)

Por komponaĵo:

I premio — Emil Sâev, Sofio
 II premio — Veliĉka Kârparova —
 Plovdiv

Kolektivaj plenumoj

Por muntaĵo: I premio — E-grupo „Serdika“ — Sofio
 II premio — E-grupo — Silistra
 Por grupa kantado: I premio — Kantgrupo ĉe E-socie-
 to „Lumo“ — Plovdiv
 II premio — Dueto: Penka Rumja-
 nova kaj Anelija Georgieva — Ru-
 se (kun gvidanto — la 85-jara E-
 veterano Boris Kavalĝiev)
 Specialaj premioj: Folkloro ensem-
 blo „Sider Vojvoda“ — Gorna Orjaĥovica
 Ĥoro de instruistinoj — Razargik

Ĵurio por I, II kaj III grupoj:

Prezidantino: Libertaria Mladenova
 Membroj: Angelina Sotirova, Katja Delĉeva
 Nedjalko Koev

Ĵurio por IV kaj V grupoj:

Prezidantino: Belka Beleva
 Membroj: Karamfilka Adamova, Evgeni Georgiev
 Dimo Halaĉev



Ankaŭ popolkantoj bonege sonas en Esperanto!

PROBLEMOJ DE LA E-PROPAGANDO



Raportas Dončo Hitrov, ĉefredaktoro de „Bulgara Esperantisto“

Pli fruktodona kaj celkonforma informado pri Esperanto — tio estis la celo de la Unua internacia konferenco pri Esperanto-propagando, organizita de la Distrikta Estraro de BEA en urbo Vraca (28-30.3.1986). Partoprenis ĉirkaŭ 50 esperantistoj el la lando. Salutis per leteroj Umeda Yoshimi — vicprezidanto de UEA, kaj Ian Jakson — prezidanto de TEJO. La konferencon inaŭguris Stojan Pavunĉev — prezidanto de DE de BEA en Vraca.

En la baza prelego de la konferenco, farita de Dončo Hitrov — ĉefredaktoro de revuo „Bulgara Esperantisto“, li prilumis kelkajn nuntempajn teoriajn problemojn de la informado kaj propagando de Esperanto. La preleganto kunligis ilin kun la praktiko de BEA kaj de aliaj Esperanto-asocioj. Li emfazis, ke la propagando de Esperanto nun havas gravan signifon, ĉar proksimiĝas la centjara jubileo de la Internacia Lingvo.

Kunprelegis Bojĉo Mladenov — gvidanto de la junulara societo „Verda Raketo“ — Vraca, kiu parolis pri la praktika utiligo de diversaj propagandiloj. En la Urba Junulara Domo estis prezentita granda ekspozicio de propagandiloj el multaj landoj, senditaj speciale por la konferenco. La pentristo Danĉo Danev el Plovdiv, sin bazante sur la enhavo de la ekspozicio, parolis pri la signifo de arte ellaboritaj propagandiloj, ĉar nur tiaj povus fari bonan propagandon.

Radoslav Triĉkov, veterano de la bulgara Esperanto-movado, rakontis pri la propaganda agado poresperanta dum la tempo, kiam Esperanto faris siajn unuajn sukcesajn paŝojn en Bulgario. Li faris komparon de la iamaj kaj nuntempaj formoj de propagando.

La kandidato de la teknikaj sciencoj Kiril Velkov montris novajn komputilprogramojn, kiuj helpas la instruadon de Esperanto. Li parolis pri la rolo de Esperanto en la nuntempa scienca mondo.

Ljubomir Trifonĉovski — estraro de BEJ, prelegis pri la specifeo de Esperanto-propagando, direktita al la junularo.

Pri la novaj bultenoj de nia asocio kiel propaganda formo informis *Slavĉo Davidov*, redaktoro de la bulgarlingva bulteno „Informilo“, eldonata de CE de BEA. Li parolis ankaŭ pri la bona kunlaborado inter la esperantistaj organizaĵoj kaj la amaskomunikiloj en nia lando.


Per prelegoj senditaj al la konferenco kontribuis ankaŭ kelkaj eksterlandaj esperantistoj: *Edgard Homiĉ* el Sovetunio informis pri diversaj formoj de Esperanto-propagando en urbo Krasnodar. Pri la E-propagando inter infanoj kaj en la familio temis la kontribuado de *Ralf Kusse* el urbo Schwerin, GDR. Kaj lia samlandano el urbo Halle *Christian Schmitz* skribis pri la kunlaborado inter junaj esperantistoj kaj estraroj de junularaj domoj ĉe varbado de novaj gesamideanoj. La aktualecon de nia propagando en la antaŭvespero de la centjara jubileo de Esperanto traktis en sia letero *d-ro Roberto Resende* el Brazilio. Psikologiaj problemoj de la Esperanto-propagando estis en la centro de la prelego de *ing. Zdenek Mrkviĉa* el urbo Brno, Ĉeĥoslovakio. Pri la manieroj de propagando dividis sperton en sia letero *Péter Tihanyi* el urbo Tatabánya, Hungario. Estis prezentita ankaŭ la prelego de *Detlev Blanke* el Berlino, GDR — pri la aspektoj de informado kaj argumentado *pri, por kaj per* Esperanto.

Antaŭ la fermo de la konferenco Dončo Hitrov ĝeneraligis la ideojn kaj problemojn tuŝitajn en la prelegoj kaj eldiroj. Li substrekis, ke la konferenco estis fruktodona kaj ĝiajn rezultojn oni povos vidi en la estonta Esperanto-agado — pli altkvalita, riĉenhava kaj efika.

Okaze de la konferenco estis emisiita speciala koverto kun la emblemo de „Verda Raketo“ kaj teksto „Esperanto por paco kaj amikeco“, kaj unuataga stampilo en Esperanto.

Estis decidite, ke la Dua internacia konferenco pri Esperanto-propagando okazu en 1989, denove en Vraca.

L. ALEKSANDROV



D-ro Imre Pethes pri porpaca kunlaboro

Okaze de la sesio de Monda Packonsilio (MPK) okazinta en Sofio, 24-27.04.1986, Bulgarion venis d-ro Imre Pethes — prezidanto de Mondpaca Esperantista Movado (MEM) kaj membro de MPK. Li partoprenis la organizitan de Sofia Esperanto-Domo pri Kulturo „M. Gorkij“ vesperon de paco kaj prelegis pri la rolo de esperantistoj en la pacbatalo. Kunlaborantoj de la redakcio de „Bulgara Esperantisto“ profitis la okazon renkonti kun d-ro Pethes kaj starigi al li kelkajn demandojn:

— Doktoro Pethes, bonvolu rakonti kelkvorte pri vi mem.

— Mi naskiĝis antaŭ 57 jaroj en malgranda vilaĝo sur la Hungara Ebenaĵo. Mia patro estis pedagogo, kiu pro siaj politikaj konceptoj multe suferis antaŭ kaj dum la Dua Mondmilito. Pro tio jam kiel junulo mi devis labori por la vivtenado de mia familio — ja ni estis tri gefratoj, el kiuj mi estis la plej aĝa. Mi studis en gimnazio, kiun mi forlasis dum la milito kaj poste finis ĝin. Post mia abiturienta ekzameno mi komencis labori kiel ŝoforo kaj poste iĝis fervojisto. Vespere mi studis en la jura fakultato de la universitato. Mi laboris ĉe la hungara ŝtata fervojo. Ekde januaro 1985, pro diversaj malsanoj, mi pensiĝis. Mi havas tri filinojn kaj unu nepon. Mia tre amata edzino Sara helpas min plenumi mian honoran taskon — klopodi por paco, kaj eĉ toleras, ke mi multfoje estas okupata dum la festotagoj.

— Kiam vi estiĝis esperantisto? Ekde kiam vi estas prezidanto de MEM kaj membro de MPK?

— Mi iĝis esperantisto en 1950; kiel prezidanto de MEM mi estis elektita dum la UK en Varna — 1978; ano de MPK mi estas de 1979.

— Kiaj estas la rilatoj inter MEM kaj MPK?

— La rilatoj inter ambaŭ organizaĵoj estas bonaj kaj mi povas diri, ke MEM havas aŭtoritaton ĉe MPK. La esperantistoj, kunlaborante kun MPK kaj partoprenante en ĝia agado, portis novan koloron por la internacia pacmovado. Ankaŭ estonte ni daŭrigos nian komunan agadon por certigi daŭran pacon.

— Kiel disvolviĝas MEM post la 10-a Generala Konferenco en Augsburg?

— La plej grava rezulto de la 10-a Generala Konferenco de MEM estas, ke en multaj sekcioj komenciĝis vigla agado konekse kun la Internacia Jaro de Paco. Oni eldonis diversajn materialojn kaj organizas kunvenojn; par-

toprenas en diversaj porpacaj demonstracioj. De la atingitaj rezultoj ni povas konstati, ke kun komuna agado ni povas prezenti valoran sukceson. Ankaŭ estonte unu el la plej gravaj taskoj por ni estas realigo de la komuna agado. MEM-anoj ankaŭ estonte kolektive povas plenumi la honoran komision.

— Kia estas la kontribuo de la presorganoj de MEM („Paco“, „Pacaktivulo“) al la porpaca batalo?

— Gazeto „Paco“ estas taŭga tribuno por aperigo de artikoloj pri plej diversaj temoj, kion ni povas uzi por opini-interŝanĝo. Sed estos necese, ke pli multaj membroj de nia movado sendu materialojn al la redakcio.

„La Pacaktivulo“ konvenas por organizaj demandoj. La nova eksterajo surprizis min, espereble ankaŭ al aliaj ĝi plaĉos.

Laŭ mia sperto, niaj gazetoj influas al la porpaca batalo kaj donas bonuzeblajn materialojn por ni ĉiuj.

— Kiamaniere MEM-sekcioj kontaktas vin?

— Kun multaj MEM-sekcioj mi havas personan kontakton. Se mi havas eblecon partopreni ties renkontiĝojn, kunvenojn, aranĝojn, mi tion faras. Generale mi havas kontakton per leteroj. Imagu, ĉi-jare mi jam ricevis kaj respondis pli ol 320 leterojn. Estas intima, konstanta kontakto kun la sekretarioj. Tiel ni povas labori laŭstatute kaj decidi pri aktualaj temoj demokrate, kio nature apartenas al nia labormaniero.

— Kiaj estas viaj impresoj pri la agado de Bulgara MEM-sekcio?

— Bulgara MEM-sekcio ekde sia fondiĝo laboras aktive kaj atingis gravajn rezultojn. Ĝi ĉiam iniciatas novajn proponojn kaj aktive partoprenas en ĉiu internacia porpaca agado. Ankaŭ ĉi tie mi mencias, ke Bulgara MEM-sekcio kaj Mondpaca Esperantista Movado ricevas moralan kaj financon helpojn de BEA, pro kio mi kore dankas kaj mi estas konvinkita, ke la rezulto de nia agado estos sukcesplena. Nun fundamenta problemo por ni ĉiuj estas konservi la pacon.

— Dankon, d-ro Pethes! Ni elkore bondeziras al vi sanon, por ke vi povu daŭrigi vian ĝisnunan noblan agadon por paco!

Intervjuis: Veneta BALEVA kaj
Nedka VALJAVICARSKA

DUOBLA FESTO

La 21-an de februaro en la salono de legejo „Iskra“ en Sofio okazis kortuŝa solenaĵo, kiu kunvenigis multe da samideanoj — amikoj de la esperantista familio Zora kaj Todor Oŝanski. La aktiva esperantistino Zora Oŝanska, bone konata kiel ekssekretariino de la Sofia Urba Estraro de BEA, festis sian 70-jariĝon, kaj ŝia edzo Todor — sian 75-jariĝon.

La multjara instruistino Nevena Doneva emociis rakontis pri la vivovojo de Zora Oŝanska, kiu ĉiam batalis por venko de la justeco. En la nomo de E-societo „Nikola Ŝopov“, kies membro estas Zora Oŝanska, ŝin gratulis Venezia Jona, kaj Ivan Peev — sekretario de BEA, tralegis salutleteron al la jubileulino. Pri Zora Oŝanska parolis ankaŭ Veselin Rizov en la nomo de la Sekcio de kolektantoj ĉe BEA kaj reprezentantoj de diversaj urbaj societoj kaj amaspolitikaj organizaĵoj.

La etoso dum tiu festvespero estis preskaŭ nepriskribbla. Oni devus partopreni ĝin por eksciti la varman amon, grandan estimon kaj dankemon al Zora Oŝanska.

Ljuben GROZDANOV

MI REMEMORAS...



Kiam mi estis lernantino en la sesa klaso en Vidin, mi hazarde konatiĝis kun la tiama veterano-esperantisto Evstati Cifudov. Li klarigis la signifon de la internacia lingvo Esperanto al mi kaj al mia pli juna frato Tinĉo, donis al mi lernolibron kaj instruis al ni la unuan lecionon. Kiel junulino mi amikiĝis kun la esperantisto Todor Oŝanski, kun kiu mi poste edziniĝis.

En 1936 ni transloĝiĝis en Sofion, kie ankaŭ trovis esperantistojn. Sur strato „Alabin“ 52 tiam estis la esperantista domo. Ni fariĝis konstantaj partoprenantoj en ĝiaj aranĝoj (partoprenis kurson gvidatan de Asen Grigorov) kaj pasiaj membroj de la tiama E-horo. La horanoj kaŝe legis la progreseman soci-kulturan ĵurnalon „EHO“ (1930—1934), kaj sekrete disdonis ĝin. Ili partoprenis la laboristajn kunvenojn en kvar-taloj „Juĉbunar“, „Batalova vodenica“ k. a. Sur placo „Slavejkov“ estis salono, kie ni prezentis programon. La polico sovaĝe malsuprenigis de la scenejo Penka Miĥajlova, kiu recitis versajon de Vapcarov kaj min, kiam mi recitis „Milito“ de Krum Penev.

En laboristaj vesperamuzejoj mi deklamis kaj kantis. En la sama periodo mi skribis kuraĝigajn leterojn kaj sendis poŝtpakaĵojn al niaj kamaradoj — fratoj kaj edzoj de miaj amikinoj, malliberigitaj kiel politikaj agantoj en la prizono de urbo Sliven. Mi vendis markojn kiel helpantino de „MOPR“ (Internacia help-organizaĵo), aktive agadis ankaŭ en la legejoj.

Pli malfrue mi fariĝis membro de Bulgara Esperantista Kooperativo. Estante jam kvardekjaraĝa, mi finis la nefinitan dum la faŝista reĝimo gimnazion kaj la Vesperan Partian Universitaton, laboris en la sindikatoj kaj en E-societo „M. Gorkij“ en Sofio, partoprenis la konstruadon de montodomo „Esperanto“ sur Vitoŝa-monto.

Unue dum du jaroj mi estis kasistino de societo „M. Gorkij“, tri jarojn mi laboris kiel respondeculino pri la studagado kaj laste — kiel sekretario de la societo. Neforgesebla restos por mi la kunlaborado kun Nano Nanov, Belka Beleva, Cano Ignev k. a. Mi iniciatis kaj per ĉiuj miaj fortoj helpis la fondon de la E-horo, kaj ankaŭ la fondon de „Klubo de la juna esperantisto“, kiu kelkfoje okupis unuan lokon en la festivaloj dank' al la sperta gvidado de Miĥail Elenov, Stefka Kalimenova kaj G. Dilova. Kelkajn jarojn mi laboris kiel sekretario de Sofia Urba Estraro. Dum tiu periodo oni kreis la subdistrikajn sofiajn E-societojn. Mi helpis iliajn unuajn paŝojn en la memstara laboro. CE de BEA honorigis min per la Honora kaj Ora insignoj de BEA.

Nun mi partoprenas la laboron de societo „N. Ŝopov“ — Sofia subdistrikto „G. Dimitrov“ kiel gvidanto de Parolanta Rondo.

Zora OŜANSKA

VIGLA AGANTO



Antaŭ kelkaj monatoj la esperantistoj el societo „Ve-kiĝo“ en urbo Ŝumen solene festis la 50-jaran jubileon de sia multjara prezidento Cvjatkо Todorov.

Cvjatkо Todorov naskiĝis en 1935 en Ŝumen en laborista familio. Li finis teknikan mezlernejon kaj jam 30 jarojn laboras kiel maŝinprojekcianto — unue en la Kombinumo por produktado de ŝarĝaŭtomobiloj „Mадara“, kaj nun en la Kombinumo por prilaborado de aluminio „St. Stamenov“.

En 1958 Cv. Todorov lernis Esperanton aŭtodidakte. En la sekvinta jaro li fariĝis membro de „Vekiĝo“ kaj estis elektita junulara respondeculo. La saman jaron (1959) li partoprenis la 19-an kongreson de TEJO en Gdansk kaj la 44-an jubilean kongreson de UEA en Varsovio. Li estis ankaŭ sekretario de la societo, prezidanto de la Distrikta E-Estraro kaj ekde 1973 — prezidanto de „Vekiĝo“. Ekde 1978 li estas membro de CE de BEA.

Grava estas la kontribuo de Cv. Todorov al propagando de la sukcesoj de nia socialisma patrolando. Tion oni povas konstati rigardante la ekspoziciojn, kiujn li ofte aranĝas dum niaj societaj solenaĵoj. Li korespondas kun multaj geamikoj el ĉiuj kontinentoj, estas pasia kolektanto de esperantaĵoj, pupoj kaj bildkartoj pri naciaj kostumoj k. a.

Cvjatko Todorov estas tre populara ne nur inter la membroj de „Vekiĝo“ kaj la esperantistoj el Sumen-distrikto — lin konas kaj estimas multaj samideanoj el la tuta lando. Li estas multjara korespondanto de „Bulgara Esperantisto“, de nia distrikta ĵurnalo „Sumenska zarja“, de la uzinaj ĵurnaloj „Avtostroitel“ kaj „Duma na metalurga“. Antaŭ nelonge Radio Sumen disaŭdigis lian tradukon el hungara gazeto pri la amikaj ligoj inter esperantistoj el la ĝemelurboj Sumen kaj Debrecen.

Pro lia senlaca aktivado kaj sindonemo sur la Esperanto-kampo Cvjatko Todorov estas honorigita per la Ora kaj Honora Insignoj de BEA. Al la jubileulo ni bondeziras sanon kaj longajn jarojn da fruktodona poresperanta laboro!

D-ro Jelez JORDANOV —
estranaro de societo „Vekiĝo“, Sumen

70 JAROJN E-AKTIVADO

Anton Genov estas unu el la multaj aktivuloj de la bulgara E-movado, kiuj dum jardekoj fordonis ĉiujn siajn fortojn por la prospero de Esperanto en ilia loko.

Naskita la 17-an de marto 1901 en Nova Zagora, dekjara knabo li restas senpatrina orfo. Kiel lernanto, li devas samtempe labori por helpi sian patron. Dum tiu tempo kaj ankaŭ pli malfrue, estante instruist

la junulo interesiĝas pri la politikaj bataloj tiutempe kaj simpatias la progresemajn tendencojn en nia socia vivo. Tute nature, kiam post la Naŭajunia puĉo 1923 kmenčiĝis la Septembra Ribelo, li aktive partoprenas ĝin. En la sama tempo la progresema junulo lernas la internacian lingvon Esperanto. Felice li restas viva post la frakaso de la Septembra Ribelo kaj la blanka teroro en 1925. Sed la instruistan profesion li plu ne povis praktiki, ĉar la faŝista registaro malpermesis al li tion.

En 1924 kun siaj geamikoj Ivan Lafčiev, V. Sapatov, Stanka Mirčeva k. a. li komencas aktive okupiĝi pri Esperanto. Ili restarigas la E-societon „Edmond Privat“ en Nova Zagora, fonditan en 1907.

Dank' al la vigla laboro de Anton Genov la societo fariĝas centro de la E-movado en la regiono — ĝi organizas manifestaciojn en la Tago de la slavaj klerigantoj Kiril kaj Metodij, ekspoziciojn, prelegojn kaj aliajn aranĝojn.

Anton Genov, dank' al sia internacia korespondado, jam havas amikojn en la tuta mondo. Multaj el ili kiel Mustafa Raden el Jugoslavio, I. R. Serer el Usono, Ali Akber el Irano, Karolij Bela el Hungario k. a. gastis al li, en lia hejmo. Li profitis la ĉeeston de tiuj interesaj personoj en la urbo kaj organizis prelegojn, kiuj estis interpretataj el Esperanto por la neesperantista publiko. Tio ege helpis la Esperantan propagandon en la urbo kaj ties regiono.

Post la 9-a de Septembro 1944 Anton Genov komencas libere propagandi Esperanton. Jam kiel instruisto en la mezlernejo en Nova Zagora, li instruas ankaŭ la Internacian Lingvon. Centoj da ĝelernantoj vizitadis la kursojn, kiujn li organizis. Ne nur lernantoj estis liaj kursanoj, sed ankaŭ multaj civitanoj, kiuj dank' al li ekamis la lingvon.

Aktiva kaj energia, Anton Genov agadas ne nur en sia naskiĝurbo, sed ankaŭ en la regionoj de Stralga, Tvardica, Jambol, Radnevo, Omarčevo k. a. Vizitante multajn universalajn kongresojn, li uzis la eblecon perfektigi en la metodiko de instruado de la lingvo, vizitante „Ĉe“-kursojn, partoprenis kiel fondinto en la internacia veterana organizo.

Jam preskaŭ sep jardekojn Anton Genov sindone laboras por Esperanto. En la jaro de lia 85-jara jubileo ni salutas lin kaj bondeziras al li sanon kaj fortojn por plua aktivado en la bulgara E-movado.

Dimităr PAPAŖOV

En la lando de lotusfloroj

(daŭrigo de n-ro 5/86)

HANGĜOU

Post veturado tra montaroj kaj ebenaĵoj ni atingis la fabelan urbon Hangĝou. Oni diras pri ĝi „Edeno sur ĉielo — Hangĝou sur la Tero“. Mi esperis vidi sunplenan urbon, sed super ĝi ŝvebis nigraj nuboj. Lu Gang asertis, ke la vetero baldaŭ sereniĝos.

Ni enloĝiĝis en unuetaĝa hotelo ĉe la lago Siĥu. Tio estis por ni malŝanco. Vespere svarmis kuljoj kaj pikis kruele. En knaba aĝo mi malsanis je malario kaj timis la kuljojn. Felice Lu Gang trovis baldakenon kaj mi dormis neĝenata de la sangavidaj insektoj.

La mateno estis serena kaj ni direktis nin al la fabriko de gobelinoj. Unue ni vidis la ejon de la desegnistoj. La ĉefdesegnistoj montris al ni novajn modelojn — la

Granda Ĉina Muro, antikvaj temploj, pitoreskaj pejzaĝoj, lagoj, kiesoj, portretoj de ŝtatviroj, poetoj kaj verkistoj.

Kun granda intereso ni observis, kiel oni ellaboras ĉinajn ombrelojn. Kiam la ombrelo estas preta, sur la streĉita silka teksaĵo knabinoj lerte pentras pejzaĝojn, birdojn, bestojn.

Nia alveno en tiun ĉi feriurbon koincidis kun kelkaj ekspozicioj.

La ekspozicio de ventumiloj malkovris al mi la miljaran historion de tiu ĉi metio. Estis eksponitaj pli ol 1500 ventumiloj, faritaj el santala arbo, el palmofolioj, silko, papero anseraj plumoj ktp. Kaligrafoj zorge desegnis diversajn figurojn kaj florojn.

Mirinde bela estis ankaŭ la ekspozicio de krizantemoj — pli ol 800 specoj!

Vespere ni promenis sur la lago Siĥu. Knabinoj movis la gondolon




La antikva urba pordego Ĉjanj minj nu viĝas en la centro mem de nuntempa P

UNIKA TURISTA SIMPOZIO

De la 13-a ĝis la 18-a de marto 1986 en Budapeŝto okazis II Internacia Simpozio pri Esperanto-Turismo. Ĝian laboron partoprenis pli ol 30 personoj el 12 eŭropaj landoj. Inter ili estis reprezentantoj de la vojaĝoficejoj „Express“ — Hungario, „Esperantotur“ — Pollando kaj Benelukso, „Suno kaj Maro“ — Italio, „Esperanto-Turizm“ — Turkio, kaj de la Internacia Esperanto-Kursejo — Bulgario.

Ceftemo de la simpozio estis „Esperanto en la organizita turismo“. Post konciza skizo pri la nuna stato de la Esperanto-turismo farita de reprezentantoj de la partoprenantaj landoj oni vigle diskutis, kiamaniere oni devas agi por ĝenerala evoluo de la Esperanto-turismo kaj speciale por ĝia aplikado en vojaĝ-oficejoj. Tre konkretajn kaj utilajn proponojn en Esperanto faris sinjoroj Márton Lengyel — vicprezidanto de la Hungara Tutlanda Turisma Oficejo kaj Gjula Sárdi — internacia direktoro de la Junulara kaj Studanta Vojaĝoficejo „Express“.

La simpozio rememorigis, ke la favora deklaro akceptita de la Monda Turisma Organizaĵo en Manilo 1980, substrekas la valoron de la lingvoscio kaj speciale de lingvoj kun universala destino, kiel ekzemple Esperanto kaj ke UNESKO en sia 23-a Ĝenerala Konferenco



Partoprenintoj en la Turisma Simpozio.

en Sofio (1.10.1985) per oficiala rezolucio decidis, ke la centjarigo de Esperanto estu solene festata en la tuta mondo.

La simpozio notis la rezultojn atingitajn en la sfero de internacia turismo fare de vojaĝ-oficejoj kaj turismaj organizaĵoj en pluraj landoj kaj aparte la konsiderindajn atingojn de la Internacia Asocio „Monda Turismo“ en aplikado de Esperanto.

La III Internacia Simpozio pri Esperanto-Turismo okazos de la 19-a ĝis la 24-a de julio 1987 en Bydgoszcz, Pollando.

Nikola NIKOLOV

per stangoj kaj kantis mallaŭte. Ni ĝuis la sunsubiron post la monĵoj.

ŜANHAJO

La trajno nin portis al la plej granda urbo de Ĉinio. Ni enloĝiĝis en unu el la trideketagaj hoteloj. Mi deziris viziti la faman hotelon „Ŝanhajo“.

— Vi certe legis la romanon de Viki Baum. Ĝia enhavo estas tute malsimila al la iama vivo en tiu hotelo. En ĝi troviĝis ruleto kaj tie hazardludis riĉaj eŭropanoj kaj usonanoj.

Seniluziiginte, mi revenis al „mia“ hotelo. De la dudeka etaĝo mi vidis la panoramon de la haveno kaj la kvartalon tie — „La ĝangalo de Ŝanhajo“. Ankaŭ en tiu ĉi parto de la urbego loĝas riverhomoj, kulĵoj kaj velorikiŝoj.

lumatene, kiam super la riverhaveno ŝvebis malpeza nebulo, ni supreniris kanonboaton por vidi, kiel la ŝipanoj gardas la marlimojn de la respubliko. La kanonboato

eliris el la haveno kaj direktiĝis al la marmezo. La landstrio malaperis post la horizonto. . .

La novembra suno subiris post hotelo „Ŝanhajo“, kiam ni revenis de la promeno kun la kanonboato.

NANKINO

Denove veturado. Iloke la fervojo iras paralele kun la Granda Kanalo. La agroj estas homplenaj. Iuj tiras duradajn veturilojn, aliaj fiŝkaptas. Jonkoj glitas tien kaj reen sur la kanalo. Kiam la vento ĉesas peli la jonkojn, la jonkistoj remas aŭ puŝas per longaj stangoj.

— Vi baldaŭ vidis la antikvan urbon Nankino — komencis rakonti Lu Gang. — Iam ĝi estis sidejo de Ming-dinastio (1368—1644). En Nankino la diplomatoj de Qing-dinastio subskribis humiligajn kontraktojn, kiuj ebligis al la britaj koloniistoj forpreni el ĉina suvereneco kelkajn havenojn, inter ili Kantonon, Ŝanhajo, kaj konstrui en Hongkong kolonion, kiu ankoraŭ

estas sub brita jugo. La nomo de Nankino estas ligita ankaŭ kun aĉa perfido fare de Ĉang Kajŝi. La 24-an de marto 1927 Ĉang per la helpo de usonaj militŝipoj atakis la urbon kaj liaj soldatoj murdis pli ol 80 mil revoluciulojn. En Nankino en 1911 naskiĝis la respubliko.

Honore al la gvidanto de la pola ribelo doktoro Sun Jatsen estas konstruita majesta blankmarmora maŭzoleo en belega parko ekster la urbo. Por eniri la sarkofagejon ni supreniris 328 granitŝtupojn. La maŭzoleo apogas sin sur dekdu kolonoj el nigra marmoro! Sur tabeloj oni legas pensojn de Sun Jatsen:

„Se nia revolucio lernos de la rusoj, ĝi estos nevenkebla.“

„Al batalo kontraŭ la imperiistoj — por egalrajteco de la nacioj en Ĉinio!“

„Demokratia respubliko, plenrajtoj kaj libero!“

Sur montopinto Ziziŝan apud Nankino troviĝas subĉiela ekspozicio de antikvaj astronomiaj aparatoj. La direktoro de la ekspozicio

UTILA INTERNACIA ARANGO

En vilaĝeto Radzików (situanta 30 km okcidente de Varsovio) la 20-an-24-an de marto j.k. okazis la IV Seminario por Esperanto-Aktivuloj. Ĝin organizis Pola Studenta Esperanto-Komitato (PSEK) laŭ interkonsento kun la Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO). Ĉeftemo de la ĉi-jara TEJO/PSEK-seminario estis la historio, agado kaj taskoj de unu el la TEJO-komisionoj, nome la Komisiono pri Eksteraj Rilatoj (KER). La seminarion partoprenis la tuta TEJO-estraro, ĉe-kape kun la prezidanto Ian Jackson. Ĉeestis ankaŭ d-rino Barbara Despiney — estrarano de UEA pri eksteraj rilatoj kaj junularo. La arangon partoprenis pri ol 30 esperantistoj el Bulgario, Ĉeĥoslovakio, FRG, Hungario, Italio, Okcidenta Berlino kaj Pollando. Reprezentantoj de Bulgara Esperanto-Junularo (BEJ) estis Maria Jankova — sekretario, Ljubomir Trifončovski kaj Metodi Angelov — estraranoj.

Dum la seminario la ĉeestantoj aŭskultis interesajn prelegojn, diskutis en apartaj laborgrupoj, kies partoprenantoj dum plenaj raportis pri la rezultoj de sia laboro. Por doni ideon pri la seminaria laboro, mi menciis la plej gravajn prelegojn: „Pioniraj tempoj de KER“ de Hans Bakker (sonbendo); „Internacia junulara kunlaboro“ de Marie Vančurova — unua vicprezidantino de TEJO; Elizabeth Schwarzer — respondeca pri KER, Martin Haase — estrarano de TEJO kaj Paweł Janowczyk — prezidanto de Pola Esperanto-Junularo; „Jubilea agado de TEJO“ — Ian Jackson, „Kio estas TEJO — esencaj faktoj“ — Norberto Salletti — estrarano de TEJO; „Eksteraj rilatoj de UEA kun speciala konsidero pri rilatoj kun UNESKO“ — Barbara Despiney; „Neŭtraleco de la E-movado“ — Jan Koszmaluk — ĝenerala sekretario de TEJO. La lasta tago estis dediĉita al la agado de la Komisiono pri Aktivula Trejnado (KAT), kiun gvidas Jarek Parzyszek.

Enkadre de la seminario okazis ankaŭ kunsido de LKK de la 43-a Internacia Junulara Kongreso en Krakovo en 1987.

La bulgaraj reprezentantoj aktive partoprenis la seminarian laboron. Maria Jankova prelegis pri la

kunlaboro de BEJ kun la junulara organizaĵo en Bulgario — la Dimitrova Komsomolo. La bulgaroj havis renkontiĝojn, interparolojn kun reprezentantoj de aliaj junularaj E-sekcioj. Rezulte estis planitaj reciprokaj partoprenoj en naciaj esperantistaj arangoj kaj junularaj laborbrigadoj. Denove estis konfirmitaj la tradicie bonaj rilatoj inter BEJ kaj la Hungara kaj Pola junularaj E-sekcioj, estis faritaj paŝoj al kunlaboro kun la junularaj E-sekcioj en FRG kaj Italio.

La gastamaj polaj dommastroj faris ĉion eblan por krei bonajn laborokondiĉojn kaj agrablan etoson dum la seminario. Gajaj kaj interesaj estis la interkona kaj internacia vesperoj, emociigajn minutojn oni travivis kun la kantoj de Roman Bura.

M. B.

TEJO — KIUDIREKTEN?

Ian Jackson — 28-jara brito, advokato en Hongkongo. Prezidanto de la Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO) — elektita en 1983 dum la Internacia Junulara Kongreso en Debrecen (Hungario). Membro de la TEJO-estraro ekde 1979.

— Sinjoro Jackson, kial la TEJO-estraro dediĉis la seminarion plejparte al la agado de la Komisiono pri Eksteraj Rilatoj (KER)? Via inaŭgura prelego estis „KER — kiucele? Faktoj kaj fantazioj.“ Ĉu vere „fantazioj“?

— Kompreneble ne! Tiun titolon elektis la organizantoj de la seminario. Eble „fantazioj“ sonas pli interese, eĉ pli disputeble ol, ekzemple, „imagoprovoj“ aŭ „planoj“. Fakte la aktiveco de KER havas nenion komunan kun fantazioj, ĉar KER-anoj sufiĉe reale konscias la eblecojn de sia komisiono kaj la eblajn rezultojn de ĝia agado.

Mi mem dum pluraj jaroj ne estis kontenta pri la KER-laboro. Ĝiaj membroj ne havis klarajn celojn, agis spontanee. Apenaŭ lastatempe KER atingis bonajn sukcesojn konekse la rilatojn kun internaciaj registaraj junularaj organizaĵoj. Fakte la komisionanoj agas en tre komplikaj kondiĉoj, ĉar ili devas lerte ekvilibri inter diversaj politikaj ideoj kaj deziroj

montras inventaĵojn el la dua jarcento a.n.e. La inventisto Ĉang Hen estas samtempulo de Ptolemeo, laŭ kiu la Tero estas centro de la universo.

— Kiamaniere Ĉinio atingis tiajn sukcesojn en la antikveco? — mi demandis.

— La progreso en agrikulturo kaj komerco antaŭenpuŝis la astronomion, matematikon, geografion kaj medicinon, — klarigis li.

Ni vidis seismografon, vojmezurilon, ĉielglobon. Ĝi estas la unua en la mondo aparato, montranta la moviĝadon de la planedoj. La astronomo Ĉang Han malkovris 250 stelojn — duoble pli ol malkovris Ptolemeo. Ĉinaj astronomoj jam en 1050 jaro, la kvaran de julio, konstatis la estingiĝon de iu stelo. Unue ĝi estiĝis pli brila ol estas Venuso. Ĝia brilo estis vidata eĉ tage. Post unu jaro ĝi estingiĝis kaj malaperis.

Paro de bronza kolonoj, la suda pli alta ol la norda, prezentas la



S-ro Geoffrey Sutton, ĉefredaktoro de revuo „Esperanto“, kun pekinaj esperantistoj.

flanke de tiuj junularaj organizaĵoj. Ili helpas materiale al ni, sed strebas transformi Esperanton en kanalon por diskonigi de siaj vivkonceptoj. Pro tio ni agadas atente por gardi nian politikan neŭtralecon.

Finfine, por ilustri la agadon de la Komisiono pri Eksteraj Rilatoj, mi donos nur unu ekzemplon. Laŭ iniciato de TEJO kaj laŭ invito de la Internacia Unuiĝo de Studentoj (IUS) la estraroj de ambaŭ organizaĵoj renkontiĝis en Prago (1983) kaj dum du tagoj interŝanĝis opiniojn pri diversaj gravaj temoj de la nuntempa vivo: paco, kulturo, edukado en la evoluantaj landoj ktp.

— Kio ŝanĝiĝis en la agado de TEJO post via elekto kiel prezidanto de tiu organizaĵo?

— Unu el miaj celoj estis la pliproksimiĝo de TEJO al la junularaj internaciaj organizaĵoj. Ekzemple, TEJO estas egalrajta membro de la Eŭropa Kunordiga Buroo de Internaciaj Junularaj Organizaĵoj (EKB). Fakte ĝi estas forumo, kie oni diskutas pri la celoj kaj taskoj de la neregistaraj junularaj organizaĵoj (fakte nur el okcidentaj landoj). Tiel ni eksciis multe pri la funkcioj kaj labormanieroj de la organizaĵoj, kiuj membras en EKB: junaj laboristoj, skoltaj k. a. Dank' al nia membreco en EKB multe da junuloj komencis interesiĝi pri Esperanto kaj inviti TEJO-n por organizi lingvajn kursojn.

TEJO ne povas esti membro de IUS, ĉar ĝi estas nur studenta organizaĵo. Sed en TEJO membras ankaŭ studentoj kaj pro tio ambaŭ organizaĵoj povas interŝanĝi ideojn.

Mi estas adepto de la ideo, ke la TEJO-agado kaj la junulara E-movado devas eliri el la Eŭropaj limoj. Ĉar Esperanto estas lingvo por ĉiuj nacioj, ĉu ne? La fakto, ke mi laboras en Hongkongo helpas al mi pliproksimiĝi la aziajn esperantistojn al la TEJO-agado.

En la periodo post la TEJO-kongreso en Debrecen ni renovigis nian kunlaboradon kun UEA. TEJO havas sian observanton ĉe la estraro de UEA.

— Kiaj estas la aktualaj problemoj de TEJO?

— Unue, la manko de monrimedoj. Due, TEJO finfine devas havi sidejon ie, kaj pro historiaj kialoj — en Nederlando. Nun TEJO obeas certagrade al ekonomiaj reguloj, kiujn regas la usona dolaro. Ĝenerale en tiu dolara sfero la libervolaj organizaĵoj estas malriĉaj. La malriĉeco de TEJO malhelpas nian agadon — tio estas nia plej malfacile solvebla problemo.

Alia malfacilaĵo: pro politikaj kialoj ni ne povas libere starigi rektajn kontaktojn inter junuloj el diversaj landoj. Sed mi estas optimisto, mi kredas ke iom post iom tiuj problemoj reduktiĝos.

Kaj jen lasta problemo: la vivo de TEJO-aktivulo estas tre mallonga. Homo membrigas, spertiĝas, fariĝas gvidanto kaj preskaŭ tuj pro aĝigo li devas forlasi la junularan movadon. Tio devigas nin konstante renovigi niajn fortojn. Fakte tio estas la tasko de la Komisiono pri Aktivula Trejnado.

— Kiajn iniciatojn TEJO realigos okaze de la centjara Jubileo de Esperanto?

— La junaj esperantistoj dediĉos multajn iniciatojn al la jubileo ĉefe en la kadroj de la landaj sekcioj. TEJO kunordigos ilian agadon.

Honore al la granda datreveno TEJO organizos en Krakovo (Pollando) la 43-an Internacian Junularan Kongreson (IJK); aperos speciala jubilea numero de „Kontakto“, kiu estos tradukita en plurajn naciajn lingvojn; oni okazigos konkurson fotografian kaj grafikan sub la titolo „Esperanto, junularo kaj amikeco“. La premiaĵojn pentraĵojn, fotojn, afiŝojn k. a. ni ekspoziciis dum la kongresoj en Krakovo kaj Varsovio.

— Rakontu pri la laboro de LKK, mi petas! Kiam okazos la 43-a IJK? La ĉeftemo? Kiom da junaj esperantistoj vi atendas?

— LKK funkcias de la printempo de 1985. Ni jam havas kongresan sidejon — en studenta urbo de Minist-fandista akademio en Krakovo. Tie kongresos proksimume 1000 esperantistoj en la periodo 17-24 de julio 1987. La kongresa temo estos „Homo kaj socio fronte al civilizaj minacoj“.

— Sinjoro Jackson, kia estas via opinio pri la bulgara junulara E-movado?

— Verŝajne la bulgara E-movado — la junulara kaj plenkreskula, estas inter la plej evoluintaj en la mondo. Aliflanke la partopreno de reprezentantoj de la Bulgara Esperanto-Junularo en TEJO dum la lastaj jaroj estis nesufiĉe aktiva, malgraŭ ke BEJ havas kvar anojn en la Komitato de TEJO. Ne estas kaj ne estis dum la lastaj jaroj estrarano de TEJO el Bulgario. Tasko de TEJO devas esti pli intime engaĝi sin kun la bulgara junulara movado, ekzemple en la okazigo de TEJO-seminario en via lando. Kaj tasko de BEJ devas esti pli aktive partopreni la TEJO-agadon.

Intervjuis: Maria JANKOVA

aparaton Tuguj. Ĝi montras, kiam la suno trairas la ekvatoron kaj kiam la noktodaŭro egalas al la tagodaŭro: la printempa ekvinokso (21 aŭ 22 de marto) kaj la aŭtuna (22 aŭ 23 de septembro).

— Ankaŭ la kompasoj — diris la direktoro — estas inventita en nia lando. Ĉinaj ŝipanoj utiligis la kompasojn en la dekdua jarcento, kiam ili atingis la Korean Duoninsulon. Araboj havigis al si la ĉinan kompasojn, poste sekvis eŭropanoj.

En la fako de armiloj ni vidis kanonon „Hoĉung“, inventitan en la sepa jarcento, kiam la ĉinoj eltrovis la pulvon. Laŭ ĉina recepto araboj kaj persoj komencis produkti pulvon.

Ĉe glaso da teo mi demandis, kia estas la kaŭzo, ke Ĉinlando, iam tiom inventema, postrestis en la lastaj jarcentoj.

— Kulpas feŭdismo kaj koloniismo. Dum jarcentoj en nia lando regis dinastioj, kiuj estis vasaloj de imperiistoj. Krom tio la lando suferis pro la intercivitana militoj.

Mankis do kondiĉoj por scienca laboro.

DENOVE SENJANG

En tiu ĉi norda urbo finiĝis mia rondvojaĝo. Lasta mateno en Ĉinlando. Ni eniris restoracion „Mukden“ por matenmanĝi. La supo, kiel kutime, estis bongusta. Mi dankis la spertan kuiriston kaj demandis el kia viando li preparas la supon, ĉu el kokidoj aŭ el ŝafidoj? Anstataŭ respondi per vortoj, li kuspis la manikon kaj montris per la mano kiel zigzagis kaj rampas serpento... Mi tuj flankenlasis la supon. Lu Gang ridetis kaj simplanime respondis:

— Sed vi ja multfoje mangis supon el serpenta viando.

— Ĉu vere? Mi ĉiam pensis, ke mi mangas supon el kokidaĵo kun cepo...

— Ja kelkfoje mi aludis, eĉ ripetis, ke ĉinoj mangas ĉion, kio flugas, rampas kaj naĝas...

Mia indigno liveris amuzon al Lu Gang.

Revenante hejmen per soveta trajno, mi notis en la agendo: Alveno — septembro, forveturo — decembro. Kvar monatojn mi veturis en akompano de Lu Gang — ĉu per vagonaro, ĉu per aŭtomobilo. Tra mia penso glitis nomoj de urboj kaj urbetoj: Senjang (Mukdeno), Ŝanhajo, Anŝan, Tianggin, Pekino, Zinan, Senhi, Hankoŭ, Kanton, Hangĝou, Nankino... En tiuj ĉi urboj mi spektis klasikajn ĉinajn dramojn, admirante buntajn kostumojn kaj lertecon de la aktoroj, mi vizitis koncertojn, muzeojn, lernejojn, fabrikojn, pagoĉojn...

Per tiuj ĉi notoj mi finas miajn impresojn pri la fora lando de lotusfloroj, kiu ĉi-jare gastame akceptos milojn da esperantistoj el la tuta mondo.

HO MO GO

(Fino)

SPERTOJ DE NIA INTENSA E-KURSO

De la 31-a de marto ĝis la 10-a de aprilo 1986 en Bulgario okazis la Unua Intensa Kurso de Esperanto, organizita de la Instrua Komisiono ĉe Bulgara Esperantista Asocio, senpere surloke realigita fare de la Distrikta Estraro de BEA en Jambol. La kurso okazis en la belega nova montodomo de Stroitelno-Montajen Kombinat, situanta sur la monteto Baĝik, 17 km oriente de Jambol.

La Intensan Kurson gvidis tri ĝeinstruistoj: Cvetana Kostova, Anka Angelova kaj Marin Băcev — ĉiuj el Sofio. Dum naŭ tagoj oni instruis po naŭ horojn: antaŭtagmeze estis kvar instruhoroj, dum kiuj la du instruistinoj instruis po du horojn, prezentante dum la unua horo la gramatikon kaj dum la dua horo la leksikon de unu leciono. Posttagmeze estis tri instruhoroj: la unua estis ekzercado pri la unua antaŭtagmeza leciono, la dua — pri la dua antaŭtagmeza leciono kaj la tria estis speciala instruhoraro pri dialogado, kiam oni prezentadis kaj ekzercadis dialogojn (entute 60) el la nova lernolibro de Andrzej Pettyń „Bonan vojaĝon!”. Vespere estis duhoraj okupoj, dum kiuj estis diverskarakteraj **didaktikaj lingvaj ludoj** (oni utiligis la ĵus aperintan libron samtitolan de Aleksandr Fjodorov) kaj amuzludoj; dum tiu tempo la kursanoj povis praktiki la novajn konojn akiritajn dum la tago. Duonhoro de tiuj vesperaj okupoj estis dediĉita — kiel fino de la labortago — al kantado laŭ speciala programo, precipe kun facila kaj amuza enhavo. Hejmtaskoj ne estis donataj, ĉar dum la tago estis streĉa laboro kaj la kursanoj bezonis ripozon. Dum la instruado la tri ĝeinstruistoj klopodis apliki diversajn aŭdvidajn instruhelpilojn, ekz. kasetofono, gramofono, diversaj mezgrandaj kaj grandformataj bildoj, diversaj bildkartoj, desegnaĵoj (interalie la „66 Bildoj” de Neno Janev), bildlibroj sen teksto (ankaŭ la slovena libro „En Ten tini”) kaj kun iom da teksto (ĉinaj porinfanaj bildlibroj), diversaj Esperantaj ludkartoj, grafoskopo, diafilmoj, lumprojekciilo pri maldiafanaj bildoj, mapoj, afiŝoj bildaj kaj gramatikaj, sondiskoj kun modela elparolado, sonbendoj (al la lernolibro „Dek tagojn Esperanto” de Jozefo Horváth) kaj ĵetkuboj por ekzerci la numeralojn. Estis uzata la konata lernolibro de aŭtoro trio, sed la lastajn 8 lecionojn (19—26) oni ne instruis pro manko de tempo kaj precipe pro manko de gramatiko en ili, kiun gramatikon (**bo-**, **pra-**, **eks-**, **um-**, **end-**, **id-**, **ing-**, **-ĉj**, **-nj**) oni instruis dum aliaj instruhoroj. Laŭ la **regularo pri civitanaj E-kursoj** iuj el tiuj afiksoj estas instruendaj en la kurso por progresintoj (dua grado).

Dum la lastaj tri tagoj la metodikisto pri Esperanto Marin Băcev organizis individuajn ekzercojn pri korekta elparolado kun ĉiu kur-

sano, atentigante ilin pri la reduktado de la vokaloj **a**, **e**, **o** en neakcentita pozicio kaj pri la **senvoĉigo** de la sonoraj konsonantoj je la fino de la silabo.

Sukcese ekzamenigis 11 gekursanoj: kvin kursanoj ricevis noton „boneĝe”, kvar — „tre bone”, du — „bone”.

La rezultoj estas malpli bonaj ol la **atendendaĵ!** La kialo estas, ke la kurso ne estis organizita „sufiĉe” malproksime de la distrikta urbo kaj kelkaj gekursanoj ofte veturis hejmen posttagmeze kaj vespere, **ne partoprenante** la instruhorojn dum tiu ĉi tempo! La celo de la Intensa Kurso (laŭ la ideo de la gvidanto) estis dronigi la kursanojn en Esperantan medion dum la tuta tempo de la 11-taga restado. (Estis planite, ke la dormado de la grupo, kune kun la helpanto, okazu en unu kaj sama ĉambro, kio ne realiĝis, ĉar en la montodomo estis nur trilitaj ĉambroj!). Sed iuj el la kursanoj ne estis disciplinmaj tiurilate, kio certe kontribuis al ilia malpli bona fina rezulto ĉe la ekzamenigo.

La sindona laboro de ĉiu el la ĝeinstruistoj treege impresis la gekursanojn, kiuj tuj rimarkis ilian pretecon fari ĉion eblan por enkapiĝi al la kursanoj kiel eble pli facile kaj pli multe da gramatikaĵoj kaj leksiko dum la difinita tempo, por paroligi ilin.

Fine de la kurso la gvidanto donis al la gekursanoj kelkajn konsilojn kiamaniere daŭrigi la studadon de Esperanto memstare kaj nepre praktiki ĝin parole — en la loka E-societo, kaj skribe — per korespondado kun alilandaj gekolegoj. Al ili oni donis la adresojn de Koresponda Servo Mondskala de UEA kaj de Internacia Koresponda Adresaro en Liberec. Ĉiuj gekursanoj regule ricevados la Bultenon de la Instrua Komisiono ĉe BEA pri la instrua laboro (**Informilo**). Iuj jam planas partoprenon en diversaj someraj E-aranĝoj. Tamen ilia ĉefa celo estas daŭrigo de la studado de Esperanto en duagrada kurso en Pisanica en julio aŭ aŭgusto, aŭ en la senpaga 20-taga kurso organizata de la Centra Instituto por Perfektigo de Instruistoj en Sofio (Knjaĵevo).

La ĉefa loka organizanto Dimităr Hristov bonege plenumis siajn taskojn de gastiganto de la kursanoj en tiu belega montodomo.

La partopreno en la Intensa Kurso estis tute senpaga. La elspezojn kovris la Centra Estraro de BEA laŭ peto de la Distrikta Estraro de BEA en Jambol.

La gvidantoj de tiu Intensa Kurso devas nepre organizi duan similan kurson en proksima tempo, ĉar evidentiĝis, ke similaj kursoj estas tre utilaj kaj fruktodonaj.

PACA FORUMO EN VOLGOGRAD



Dmitrij Perevalov el Moskvo donacas la Deklaron de Miĥail Gorbaĉov. De dekstre — maldekstren: d-ro Imré Péthés, prof. Magomet Isajev kaj Ipatov.

La 9-an-12-an de aprilo 1986 en Volgograd okazis internacia renkontiĝo „Esperantistoj en la batalo por paco kaj malarmado“. Proksimume 300 senditoj el 15 landoj kolektiĝis en la legenda urbo. Ne hazarde la Asocio de Sovetiaj Societoj por Amikeco kaj Kulturligoj kun Eksterlando kaj la Asocio de Sovetiaj Esperantistoj decidis, ke tiu impona manifestiĝo devas okazi sur la multesuferinta tero de la urbo-heroo.

La forumo de esperantistoj-pacbatalantoj estis sole malfermita la 9-an de aprilo. Ĝiajn partoprenantojn varme salutis A. Marsakova — vicprezidentino de la Plenumkomitato de Volgograda Urba Konsilantaro, la prezidanto de la Distrikta Pacdefenda Komitato, doktoro de medicinaj sciencoj, prof. V. Karpenko, la prezidanto de volgoograda E-klubo „Esperanto“ ing. A. Miĥajlov.

La honora prezidanto de MEM N. Aleksiev el Bulgario kun kontenteco dividis siajn impresojn pri la restado en Volgograd. La prezidanto de la Asocio de Sovetiaj Esperantistoj, doktoro de ilologioj sciencoj prof. M. Isajev prelegis pri „Batalo por paco kaj nu-

klea malarmado en la nuna etapo“, akceptita kun granda intereso de la ĉeestantoj. D-ro Imré Péthés (Hungario), prezidanto de MEM, parolis pri „La movado de la esperantistoj-pacbatalantoj, taskoj kaj perspektivoj“. Li skizis la plej neprokrasteblajn taskojn plenumendajn, montris la gravan lokon, kiun okupas la esperantistoj en la miliona pacarmeo.

En daŭro de tri tagoj, en la matenaj kaj posttagmezaj kunsidoj, desur la tribuno sonis la firmaj voĉoj de la pacaj senditoj. Ili rakontis pri sia porpaca agado, pri la malfacilaĵoj, kiujn ili renkontas.

La mondo devas esti savita. Ĉiuj homoj rajtas vivi, sendepende de politika aparteneco, religio kaj raso. La ĉefa problemoj nun estas pridiskuto de la demando pri ĉesigo de la nuklea vetarmado. Kaj por tio estas necesa vera, konstruiva, neprokrastebla dialogo inter la grandaj ŝtatoj, antaŭ ĉio inter USSR kaj Usono.

Tiun paciniciaton partoprenis ankaŭ s-ro Yoshimi Umeda (Japanio), vicprezidanto de UEA, kiu substrekkis, ke la esperantistoj ne povas kaj ne rajtas esti pasivaj, kiam temas pri konservado de la tutmonda paco.

La internacia esperantista forumo finiĝis per akcepto de Apelo de la partoprenintoj al la pacbatalantoj el la tuta mondo.

La gastamaj volgoogradaj dommastroj promenis la esperantistojn al la historia memorloko „Mamaev Kurĝan“ — monumento honore al la senmorta heroaĵo de la bravaj defendantoj de Stalingrado, al la Panoramo-muzeo de la Stalingrada batalo, la placo de la pereintaj batalantoj, la „Volga hidroelektra centralo“, la planedario.

La 12-an de aprilo matene okazis kunsido de la membroj de IK de MEM kaj pacfunkciuloj. Ĉeestis 20 personoj. D-ro Imré Péthés pritaksis la renkontiĝon kiel fruktodona kaj rezultiva, esprimante la opinion de ĉiuj partoprenantoj. Li dankis al la dommastroj pro la bona organizo de la renkontiĝo.

Oni rekomendis al ĉiuj partoprenantoj insisti antaŭ siaj E-Asocioj pri propono de fakdelegitoj de MEM en UEA, publikigi informojn pri la pacrenkontiĝo en Volgograd en la loka gazeto. Oni alvokas al ĉiuj esperantistoj partopreni amase la paciniciaton de MEM en Elmstein, FRG, en septembro ĉi-jare.

La eksterlandaj delegitoj ankoraŭfoje esprimis sian senhezitan decidemon daŭrigi la batalon por triumfo de la paco sur nia planedo.

Vasja CVETKOVA,
Sekretario de MEM

APELO

Ni, la partoprenantoj en la Internacia Renkontiĝo „Esperantistoj por paco kaj malarmado“ (Volgograd, 8-12.04.1986), esperantistoj el Aŭstrio, Belgio, Britio, Bulgario, Ĉeĥoslovakio, GDR, Hungario, Japanio, Jugoslavio, Kanado, Pollando, Rumanio, Usono, USSR, Vjetnamio, kunvenintaj sur la multesuferinta tero de la urbo-heroo, kie okazis la Stalingrada batalo, sursojle al la 25-jara jubileo de la unua flugo de homo en la kosmon, en la Internacia tago de memoro pri la viktimoj de la faŝismo, deklaras nian subtenon al la programo por malarmado, proponita de Soveta Unio, kaj apelacias al ĉiuj esperantistoj, al ĉiuj pacamantoj en la mondo, sendepende de rasa, nacia, religia kaj socia apartenoj, ankoraŭ pli aktive batali kontraŭ la dangeregaj planoj pri militismigo de la kosmo, kontraŭ la nuklea kaj ĉiu alispeca vetarmado, streĉi la fortojn por plene likvidi la nuklean armilaron, grave redukti la aliajn specojn de armiloj kaj armitajn fortojn kaj establi sistemon de universala sekureco, de fidinda paco sur nia planedo.

Ni esprimas nian nereteneblan indignon pro la nova eksplodigo de nuklea bombo, kiun la 10-an de aprilo efektivigis la usona registaro spite al la bona volo esprimita de Soveta Unio, kiu unuflanke deklaris moratorion pri ĉiuj nukleaj eksplodigoj kaj denove daŭrigis ĝin ĝis la unua sekva usona eksplodigo post la 31-a de marto 1986.

Ni alvokas ĉiujn pacamantojn insisti antaŭ Usono, ke ĝi aliĝu al la moratorio kaj komencu traktadon kun la ceteraj nukleahavaj ŝtatoj pri plena likvido de la nukleaj armiloj kaj ĉiuj aliaj rimezoj por amasa ekstermo.

„RAPORTO EL EŬROPA ESPERANTUJO“

Tiel titolis sian modeste eldonitan libron prof. Yoshiaki (Yoshiaki) MIZUNO el Tokio, Japanio, en kiu li resumas siajn impresojn pri preskaŭ unujara vojaĝo tra „eŭropa Esperantujo“.

Jen kion li skribas en la antaŭparolo de sia libro: „Mi laboras en la Universitato Meiji en Tokio kiel profesoro de angla lingvo jam multajn jarojn. Kutime en japanaj universitatoj profesoroj havas privilegion studi eksterlande dum certa tempodaŭro — monatojn aŭ jarojn — almenaŭ unu fojon antaŭ sia eksigo. Oni donas al ili monon kaj tempon por la stud-vojaĝo.

Tio estis ankaŭ mia kazo kaj mi decidis proliiti tiun ŝancon por konatigi kun eŭropa Esperantujo. . . Car mi interesiĝis pri diversaj lingvoj, mi elektis la studtemon „La lingva situacio en Eŭropo kaj la eblecoj de Esperanto“.

Mi forlasis Japanion la 1-an de aprilo 1984 kaj revenis hejmen la 9-an de marto 1985. Travojaĝinte 28 landojn, mi vizitis ĉirkaŭ 120 urbojn, ĉeestis 50 kunvenojn de verd-stelaj grupoj kaj konatigis kun pli ol 200 esperantistoj. . . Se mi havas grandan rikolton el mia vagado, tio estas entute dank' al la helpo de tiuj samideanoj, kiuj akceptis kaj prizorgis min sindone.“

Multajn pagojn prof. Mizuno dediĉas al nia lando kaj al la bulgaraj esperantistoj, inter kiuj li havas sincerajn amikojn. Kun admiro li skribas pri la bulgara esperantista movado, pri siaj objektivaj impresoj dum la vizitoj en Sofio, Plovdiv, Stara Zagora, Liahovo, Pazargik, Pisanica kaj Slančev Brjag, pri siaj renkontigoj kaj interparoloj kun esperantistoj kaj aŭtoritatuloj en diversaj sferoj de nia socia vivo.

Same tiel objektivaj kaj interese prof. Mizuno dividas siajn impresojn pri Sovetunio, Hungario, CSSR, Pollando, Britio, Norvegio, Svedio, Francio, Hispanio kaj pri multaj aliaj landoj, kiujn li vizitis dum sia vojaĝo tra Eŭropo.

La libro de prof. Mizuno estas la unua libro en Esperanto prezentanta tiel detale kaj amplekse eŭropan Esperantuojn kaj ĝiajn plej eminentajn „civitanojn“. Ĝi estas eldonita fine de oktobro 1985, dank' al la granda sindonemo de prof. Mizuno, je liaj propraj kostoj.

„Bulgara Esperantisto“ intencas doni lokon al fragmentoj el la libro de prof. Mizuno, kiun ni tutkore gratulas pro lia interesa verko.

D. ĤITROV

EVA KONTROLOS MANUSKRIPTOJN

Laŭ pluraj petoj Esperantlingva Verkista Asocio (EVA) decidis entrepreni fakan kontroladon de manuskriptoj, ĉu laŭ peto de la aŭtoro, ĉu de la eldonisto. La kontrolo rajtigas al la signo „Lingve kontrolita de EVA“.

La kontrolkomisiono de EVA funkcias sub la gvido de akademiano Mag. Reto Rossetti, kaj partoprenas ĝin trideko da diverslingvaj verkistoj kaj lingvistoj. La kontrolado koncernas ĉefe la kampon de gramatiko, sintakso kaj semantiko, ne tuŝante la stilon, krom eventuale per konsiloj, kaj laŭ peto de la aŭtoro.

Objekto de lingva kontrolo povas esti originala verko same kiel traduko.

La kontrola laboro estos honorariata laŭ du tarifoj, depende de la logloko de la paganto: tarifo A por landoj kun alta vivnivelo, kaj tarifo B por landoj kun malalta vivnivelo.

En esceptaj kazoj oni povas interkonsenti pri pago per ekzempleroj de la libro aŭ de aliaj libroj.

Interesatoj bonvolu sin direkti per letero kun detalaj sciigoj pri la kontrolota verko al la gvidanto de la Kontrolkomisiono de EVA, Mag. Reto Rossetti, 2 Elmwood Crescent, LUTON Beds., LU2, 7HX, Britio.

La popoloj el la balkanaj landoj deziras vivi en daŭra paco kaj amikeco kaj tiu ĉi deziro estis ankoraufoje elokvente manifestita dum la ĉi-jara Esperanto-renkontigo de reprezentantoj de Helena Esperanto-Asocio (HEA) kaj Bulgara Esperantista Asocio (BEA), okazinta la 29-3-4.4.1986 en Ateno.

La 31-an de marto 1986 HEA festis sian 60-jaran datrevenon. Por tiu ĉi festo la helenaj esperantistoj invitis en Atenon reprezentantojn de Bulgara Esperantista Asocio. En la bulgara delegacio estis Dimitar Papazov — ĝenerala sekretario de BEA, Angel Todorov — ĉeldirektoro de la Internacia Esperanto-Kursejo, Nedka Valjaviĉarska — direktoro de la Sofia Esperantista Domo pri Kulturo „Maksim Gorkij“, Ivan Peev — organiza sekretario de Sofia Urba Estraro de BEA, Ĥristo Ĝelebov — redaktoro ĉe BEA, Vasil Vutov — kunlaboranto de CE de BEA, Krum Janev — fotisto, kunlaboranto de Internacia Esperanto-Kursejo kaj Georgi Miĥalkov — respondeca redaktoro ĉe CE de BEA.

Lige kun la festo de HEA, Bulgara Esperantista Asocio preparis riĉan ekspozicion, respegulantan la evoluon de la bulgara esperantista movado kaj prezentantan la agadon de Internacia Esperanto-Kursejo en Pisanica kaj en Varna.

La 31-an de marto en la salonoj de Helena Esperanto-Asocio kolektiĝis multaj grekaj esperantistoj. La prezidantino de HEA sinjorino Maria Pontika per varmaj kaj amikaj vortoj salutis la bulgarajn gastojn kaj la grekajn ĉeestantojn. Emmanuil Nikolaidis parolis pri la fondiĝo kaj la 60-jara agado de HEA. En sia interesa kaj ampleksa prelego li substrekis la pioniran rolon de Anakreon Stamatiadis — la unua greka esperantisto kaj fondinto de Helena Esperanto-Asocio. Dum la festo s-rino Maria Pontika anoncis la decidon de la estraro de HEA pri distingo de la estinta prezidanto de la Asocio, Georgios Migas kiel honora prezidanto de Helena Esperanta Asocio, pro lia multjara kaj senlaca agado.

La bulgaraj reprezentantoj utiligis sian restadon por pridiskuti gravajn problemojn de la estonta kunlaboro inter BEA kaj HEA.

La grekaj amikoj faris ĉion necesan, por ke la bulgaraj gastoj fartu kiel eble plej bone en suna Greklando. Por la bulgara delegataro estis organizita neofregebla ekskurso al Korintos, Epidavros, kie troviĝas la fama antikva teatro, Naŭplio kaj Mikenos. Krom tio, oni povis ĝui la mondlimajn monumentojn en Ateno — Akropolon, Nacian Muzeon k. a.

La renkontigo de reprezentantoj de Helena Esperanto-Asocio kaj Bulgara Esperantista Asocio montris ankoraŭfoje, ke dank' al la Internacia Lingvo la esperantistoj efike kunlaboras por la amikeco kaj proksimiĝo de du najbaraj popoloj.

Georgi MIĤALKOV

SPECIALA NUMERO DE LPLP

Honore al la Centjarigo de Esperanto en 1987, ni serĉas manuskriptojn por memoriga numero de la revuo „Lingvaj problemoj kaj lingvo-planado“ (LPLP) dediĉita al la historio de Esperanto, ĝia nuna stato kaj ĝia estonteco. Nin aparte interesos manuskriptoj, kiuj traktas la lingvan evoluon de Esperanto, la historion de la Esperanto-movado, Esperanto-literaturon, la utiligon de Esperanto en edukado kaj esploro, la rolon de Esperanto en internaciaj organizoj, kaj sociologian/sociolingvistikan analizon de Esperanto-organizoj kaj Esperanto-grupiĝoj, naciaj kaj internaciaj. Proponataj tekstoj povas esti en iu ajn lingvo. Aŭtoroj bonvolu sendi tri ekzemplerojn de ĉiu manuskripto, kune kun mallonga resumo de la artikolo en Esperanto, angla aŭ franca, kaj biografieto, al d-ro Humphrey Tonkin, administra redaktoro, LPLP, State University College, Potsdam, NY 13676, Usono. Manuskriptoj devas atingi tiun adreson ĝis la 30-a de septembro 1986.

FORPASI NIA BARDO VESELIN DAMJANOV



La 16-an de aprilo j. k. trista sciigo atingis la mondan esperantistaron — en sia 61-a jaro subite forpasis nia amata esperantista bardo VESELIN DAMJANOV.

Eksilentis por ĉiam tiu, kies kantoj ravis la partoprenantojn en multaj universalaj E-kongresoj, la diversnacia publikon en Italio, Francio, Hispanio, FRG, Sovetunio, Svedio, Kanado...

Bonkora, ĝentila, ĉiam preta helpi al junaj talentuloj, per sia belega voĉo li gajnis multajn novajn amikojn de Bulgario, inspiradis la esperantistojn-pacdefendantojn en ilia nobla agado kontraŭ la militminaco.

Tiuj, kiuj persone konis Veselin Damjanov, neniam forgesos liajn emocian sintenon, amikan rilaton, ĉarmantan rideton. Lia loko sur la monda E-scenejo ĉiam vakos!

La bulgaraj esperantistoj estime kaj profunde klinigas antaŭ la hela memoro de Veselin Damjanov.

Eterna estas lia artolo!

AL VESELIN

Jam ĉesis bati koro lia,
silentas najtingalkantaro,
vakuas nun scenejo nia,
kaj daŭrigendas ariaro...

Memore sonos Gal Cezaro,
Nazar, Kalhas, Favar, Aleko
kaj la sennombra rolludaro
de Vesko glora dum jardekoj.

Ni longe ame lin memoros
post lia krea hela spuro;
„Adiaŭ“ trista nin doloros —
funebros la muzikkulturo!

Aprilo, 1986

Krasimira TODOROVA
Esperantigis: Asen JOSIFOV

LITERATURA KONKURSO „STRANGA SAKAR '86“

Eble ni jam povus diri, ke la bela suda bulgara urbo Jambol fariĝis simbolo de festoj de la Esperanto-prozo. La 12-an kaj 13-an de aprilo j. k. la gastamaj jambolaj esperantistoj duan fojon estis dommastroj de literatura festo, kiun partoprenis ĉirkaŭ 70—80 esperantistoj — ŝatantoj de la E-prozo el Sofio, Varna, G. Orjaĥovica, Plovdiv.

La 12-an de aprilo posttagmeze en la Klubejo de Kulturagantoj en Jambol la prezidanto de la Jurio *Georgi Mihalkov* anoncis la rezultojn de la konkurso pri originala kaj traduka Esperanto-prozo „Stranga Sakar“ — respubliko de la juneco '86“. La ĝenroj estis variaj, sed ne multaj estis la feliĉuloj-gajnintoj.

Por originala rakonto estis aljuĝitaj nur du kuragiĝaj premioj: al *Djmo Trudoljubov* por lia rakonto „Trunketo de buksa“ kaj al *Georgi Jordanov* por lia rakonto „Kunlernantoj“. Ambaŭ aŭtoroj estas el Jambol.

Por traduka rakonto estis distingita per tria premio *Minko Nevolin* por lia traduko de la rakonto „Neforgesebla vojevodo“. Kuragiĝa premio estis aljuĝita al *Maria Dimitrova* el Plovdiv pro sia traduko de la rakonto „Rememoroj“. Kuragiĝan premion ricevis ankaŭ *Ilija Ivanov* el Lovec, pro la traduko de la rakonto „Sopiro al vojo“, originale verkita de Plamen Starev.

Por miniaturo estis aljuĝitaj dua premio al *Lilija Koleva* el Sofio pro ŝia „Nova legendo“ kaj tria premio al *Atanas Kostadinov* el Plovdiv (pro liaj du miniaturoj „Kia estus?“ kaj „Kio estus?“).

Por fabeloj kaj anekdotoj premioj ne estis aljuĝitaj. La ĉeestantoj havis la plezuron aŭskulti la premiiĝintajn verkojn, tralegitajn lare de iliaj aŭtoroj aŭ tradukintoj.

La reprezentanto de CE de BEA Vasil Vutov transdonis al la multjaraj fervoraj esperantistoj el Jambol: la merita kuracisto Trendafil Gramatikov, Bojan Kushev kaj Stelka Panajotova, la Honoran Insignon.

La arta programo estis interesa kaj varia — siajn versaĵojn deklamis Penka Papazova, oni ĝuis artan plenumon de Belka Beleva, kantis Maria Angelova el Sofio kaj Maria Dermengieva el Jambol...

Tiu ĉi konkurso estas laŭdinda arango kaj nia deziro estas, ke venontjare estu pli multe da partoprenantoj.

Mariana ELENOVA

INTERNACIA LITERATURA KONKURSO

Honore al la 100-jariĝo de la internacia lingvo Esperanto, la Distrikta Konsilantaro pri Kulturo kaj DE de BEA en Stara Zagora anoncas INTERNACIAN LITERATURAN KONKURSON: poeziaĵo, eseo aŭ skizo en Esperanto. Jurio konsistanta el reprezentantoj de CE de BEA kaj de DE de BEA prijuĝos kaj premios la verkojn kiel sekvas:

Por poeziaĵo:

I premio — 200 lv.

II premio — 100 lv.

III premio — 80 lv.

Por eseo aŭ skizo:

I premio — 200 lv.

II premio — 100 lv.

III premio — 80 lv.

Maksimuma amplekso:

Por poezia ero — 120 versoj, por eseo aŭ skizo — unu presfolio. Ciu aŭtoro rajtas konkursi per tri eroj.

Temo:

„La revolucia pasinteco, nuntempo kaj estonteco de Stara Zagora kaj la distrikto“.

Limdato — 20-a de februaro 1987.

Informojn pri Stara Zagora kaj Stara Zagora-distrikto estas disponeblaj al ĉiu petanto. La konkurso estas malkaŝa (publika, ne anonima). La konkursoj, tajpitajn en du ekzempleroj, sendu laŭ adreso: Distrikta Estraro de BEA, Stara Zagora, bul. „G. Dimitrov“ №101/A BG-6000 Bulgario, por la literatura konkurso.

NOVA ESTRARO DE LA SAKISTA SEKCIO

La 22-an de februaro 1986 okazis konferenco de la Sekcio de Sakistoj ĉe BEA. Pri la sekcia agado raportis la prezidanto Ivan Vojnov. La partoprenantoj pridiskutis la raporton kaj la estontan aktivadon de la bulgaraj sakistoj-esperantistoj. Oni elektis novan estraron kun prezidanto Kiril Drajev — honora membro de UEA kaj sekretario — Ivan Vojnov.

Cv. Gančeva

„TRA VENEZUELO KAJ KOLUMBIO“

La 19-an de februaro j. k. Neli Abagieva el Sofio parolis en la klubejo de Esperanto-societo „Albatroso“ en Varna pri temo: „Per Esperanto tra Venezuelo kaj Kolumbio“. Dank' al la loka ĵurnalo „Narodno delo“ kaj Radio Varna, kiuj anoncis pri tiu E-arango, la klubejo estis plena de esperantistoj kaj neesperantistoj. Dum du horoj s-ino N. Abagieva tenis la atenton de la publiko. Per bukedo da freŝaj floroj kaj tondraj aplaŭdoj oni dankis al ŝi pro la atentokapta prelego.

G. D.

DISTRIKTA RENKONTIGO

Pli ol 40 geesperantistoj el Karlovo, Plovdiv kaj Stambolijski kolektiĝis la 22-an de marto j. k. en Karlovo por partopreni la printempan esperantan renkontigon, dediĉitan al la Jaro de la Paco. La arango iniciatis DE de BEA en Plovdiv por renovigi la forgesitan bonan tradicion de regulaj E-renkontigoj, kiu antaŭ jaroj ekzistis en nia distrikto. La unua tago de la printempo estis elektita ne hazarde. En tiu tago, en kiu laŭ bona kutimo oni interŝanĝas bondezirojn pri sano kaj feliĉo, la geesperantistoj esprimis sian volon vivi en paco kaj krei feliĉan estonton.

La ĉeestantojn salutis la sekretario de DE de BEA Fani Mihajlova. Pri la taskoj de la esperantistoj en la pacbatalo parolis ing. Bojdar Leonov, prezidanto de la loka societo „Vasil Levski“. Li promesis, ke baldaŭ la esperantistoj el Karlovo transdonos 4000 subskribojn sub la „Apelo el Hiroŝimo kaj Nagasako pri totala malpermeso kaj elimino de la nukleaj armiloj“. La aktorino Veselina Kurteva deklamis la versaĵon „Al la virinoj de Greenham Common“ de B. Bojilov.

La vespero pasis en agrabla etoso.

F. M.

STUDENTA E-SOCIETO

La 21-an de aprilo j. k. en la junulara klubejo de Supera Ekonomika Instituto „Karl Marks“ — Sofio, oni solene fondis novan studentan Esperanto-societon.

Ivan Peev, sekretario de Urba Estraro de BEA, en sia salutparolo al la fondintoj emfazis, ke nun ĉe la streĉa monda situacio pli grave ol ĉiam estas lerni la Internacian Lingvon, kiu amikigas kaj fratigas la homojn, kiu helpas al la internacia kompreniĝo, kies adepto estas la plej fervoraj pacbatalantoj.

Bojdar Aleksiev el la Urba Estraro de BEA tralegis la statuton. Poste la sekretario pri idea-eduka laboro el la Instituta Komsomola Komitato — Cvetan Bankov, proponis elekton de estraro kaj la ĉeestantoj post vigla pridiskuto elektis societ-gvidantaron.

Emociojn provokis la proponoj pri nomo de la societo. En gaja amika etoso fine oni decidis, ke ĝi estu nomata „Juna ekonomikisto“.

Multajn aplaŭdojn gajnis la juna plenumanto Emil Atanasov, kiu deklamis versaĵon en Esperanto kaj artisme montris la belsonecon de la Lingvo Internacia.

Ni bondeziru al la nova studenta Esperanto-societo bonan vojon kaj multajn sukcesojn!

Veneta BALEVA

IMITINDA AGADO

● Fine de la kuranta jaro E-societo „Lumo“ — Veliko Târnovo, kune kun la Komunuma Komitato por Defendo de la Paco organizis kunvenon dediĉitan al la Semajno de Internacia Amikeco. Specialaj afiŝoj kaj kelkioja anoncado per la radio altiris al la arango multajn urbanojn, studentojn kaj lernantojn.

Per mallonga inaŭgura parolado la kunvenon malfermis k-do Ljubenov — vicprezidanto de la societo. Li emfazis la grandan signifon de la Semajno kiel unu el la plej gravaj paciniciatoj de UEA. La preleganto parolis pri la aktivado de la tutmonda kaj de la bulgara esperantistaro en la pacbatalo. Poste la ĉeestantoj kun intereso aŭskultis lecion pri la nuntempa internacia situacio kaj pri la batalo por defendo de la paco, prezentitan de lektoro ĉe la Societo por Disvastigo de Sciencaj Konoj „Georgi Kirkov“.

La riĉan artprogramon partoprenis kiel plenumantoj diversaj geesperantistoj. Aparte altiris la atenton de la publiko E-kantoj plenumitaj de junpioniroj — membroj de klubo „Esperanto“ ĉe la Distrikta Centro „Standardo de la Paco“ kun gvidanto K-dino Caneva — sekretario de la societo.

● En la elementa lernejo de vilaĝo Kamen estis fondita instruista Esperanto-societo „Amikeco“. Ĝiaj 17 anoj lernas la Internacian Lingvon en kurso gvidata de la rajthava E-instruisto Hristo Conev — inspektoro en la Distrikta Konsilantaro pri Popola Klerigo. La gekursanoj diligente lernas la lingvon de internacia amikeco, kio igas la kursgvidanton kredi, ke la semoj de li ĵetitaj falis en fekundan grundon.

● En la librovendejoj aperis la lukse eldonita libro „Veliko Târnovo 1185—1985“, dediĉita al la 800-jara jubileo de la ribelo de fratoj Asen kaj Petâr kontraŭ la Bizanca jugo.

La verko enhavas ege interesan 11-paĝan artikolon, titolitan „Veliko Târnovo — lulilo de la esperantismo en Bulgario“. Ĝia aŭtoro estas Olga Cankova — sindona esperantistino, pasia esplorantino de la Esperanto-movado en la distrikto. La aŭtorino prezentas valorajn informojn pri la Esperanto-movado en la distrikto.

● La urba societo „Lumo“ fondis ĉe la Distrikta centro „Standardo de la paco“ lernejan klubon „Esperanto“ kun gvidanto Ivanka Caneva. La klubanoj diligente lernas la lingvon kaj preparas sin por partopreni interesajn iniciatojn antaŭviditajn en la kluba plano: kolektiva korespondado kun junpioniraj E-klubo en GDR, Ĉeĥoslovakio, Hungario kaj Sovetunio; feriado en la Internacia Esperanto-tendaro en urbo Lančov-Ĉeĥoslovakio k. a.

Leonid SENJ,
sekretario de DE de BEA — Veliko Târnovo

TURISMAJ INFORMOJ

● De la 15-a ĝis la 20-a de septembro k. j. en la antikva nigramara urbo Nesebăr okazos Turisma Esperanto-Feriado-Seminaro. Detalajn informojn pri ĝi sendas al petintoj Turista Sekcio ĉe BEA, P. K. 66, 1090 Sofio.

● Por dua fojo la Turista Sekcio ĉe BEA enkadre de la kampanjo „Esperanto en la Internacia Danuba Kemado“ organizas grupon de geesperantistoj, kiuj partoprenos la Danuban regaton de la 18-a ĝis la 30-a de aŭgusto k. j. Oni startos en Vidin kaj finos la remadon en Silistra. El kelkaj urboj okazis renkontigoj kun lokaj esperantistoj. Pri pliaj informoj interesiĝantoj sin turnu al la Turista Sekcio ĉe BEA.

Ekde 1987 la bultenon „Esperanto en Turismo“ kaj la kalendaron de MT ricevas nur tiuj bulgaraj esperantistoj, kiuj estas membroj de „Monda Turismo“.



DEZIRAS
KORESPONDI

ADRESOJ EL AFRIKO

Foley A. Ekué, B. P. 13528, Lomé-Nyekonakpoe, TOGO. Laboras en elektronika laborejo. Deziras korespondi pri sia fako.

Boumediene Djamel, B. P. 432, Ilemcen, ALĜERIO (naskita en 1961) — studento.

Boko Yaovi-Saleck s/c Assoti A. Mahasso, B. P. 1334, Lomé, TOGO. Deziras korespondi tutmonde pri ĉiuj temoj.

Jaonathana Marie-Honorette, Logt. 1876/1-bis Cité 67 Ha, Antananarivo, 101 Rep. Dem. Malagasy, MADAGASCAR, studentino 25-jara, volas korespondi pri sporto, muziko, vojaĝoj, filmoj, libroj.

Brahim Djillali, 18-jara komencanto — s/c Benahmed Belarbi, Commerçant à Barbata, Sebra, wil. de Ilemcen 13, ALĜERIO.

Tognon Bernard — 20-jara Beninano. — Setodji Agbo, Centre d'Hémodialyse. C. H. U., Lomé, TOGO.

ESPERANTO EN AFRIKO

En kelkaj lokoj de Afriko la movado jam spontanee kreskigas sin mem. Estas jam plurloke „duaj generacioj“ (lernantoj de lernantoj per la koresponda kurso, distribuita el Nederlando), triaj generacioj (lernantoj de lernantoj de lernantoj) kaj eĉ kvaraj. Sur tiu ĉi foto estas „tria generacio“: en 1983 la benina junulo Tchikpe Privas lernis per skriba kurso la lingvon tre bone, kaj multege aktivis por instrui aliajn en la tuta lando. Unu el liaj lernantoj, Akpa François, nun siavice instruis al klubo en Cotonou — ĉi tie sur la foto.

Se vi volas respondi al ilia entuziasmo, vi povas skribi al: AKPA François, s/o Ecole de Base de Cadjehoun, B. P. 434, Cotonou, Popolresp. Benino.

Sur la foto: la kursanoj kaj F. Akpa, unua de dekstre.



ENHAVO

MARIA BOJAĜIEVA. Festo de nia amatora arto . . .	II
* * * Rigardo al la XXI jarcento	1
LJUBOMIR ALEKSANDROV. Problemoj de la E-propagando	5
V. BALEVA, N. VALJAVIČARSKA. D-ro Pethes pri porpaca kunlaboro	6
Niaj veteranoj	7
HO MO GO. En la lando de lotusfloroj	8
Juna esperantisto:	
MARIA JANKOVA. TEJO — kiudirekten?	10
M. IVANOV. Spertoj de nia intensa E-kurso . . .	12
VASJA CVETKOVA. Paca forumo en Volgograd .	13
Ni recenzas:	
DONČO ĤITROV. „Raporto el Eŭropa Esperantujo“	14
GEORGI MIĤALKOV. Por pli efika kunlaboro . .	14
Forpasis Veselin Damjanov	15
MARIANA ELENOVA. Literatura konkurso „Stran- ga-Sakar'86“	15
Enlanda movado	16
Deziras korespondi: Esperanto en Afriko . . .	III
Verdaj steletoj:	
WILHELM BUSCH. Maks kaj Morits	IV

Sur la unua kovrilpaĝo:

Dum la Internacia Asembleo „Standardo de la paco“ infanoj pentras sur asfalto.

VETERANA KONFERENCIO

La Sekcio de Veteranoj ĉe BEA okazigos sian duan konferencon la 26-an kaj 27-an de septembro j.k. en urbo Kazanlāk. La programo inkluzivas prelegojn, distran vesperon, viziton de la Muzeo de la rozo kaj la Domo-muzeo de la verkisto Ĉudomir. Por pliaj informoj la interesigantoj sin turnu al la distriktaj estraroj de BEA.

Stojan KOSTADINOV,
prezidanto de la Sekcio de Veteranoj ĉe BEA

NI KONDOLENCAS

Niajn vicajn forlasis la sindona esperantisto, talenta ĵurnalisto kaj teatra aganto Simeon Jordanov Baltaĝiev el urbo Bjala.

Al la parencoj de la forpasinto ni esprimas niajn profundajn kondolencojn.

La Redakcio

Cefredaktoro: Dončo ĤITROV

Redaktoroj: Ĥaim LEVI (viccefredaktoro), Lidia RAEVA (lingva redaktoro), Maria JANKOVA

Redakta komitato: Marin BAČEV, Mariana ELENOVA, Dimităr HAĜIEV, Krăstju KARUCIN, Georgi MIĤALKOV, Venelin MITEV, prof. d-ro Kiril POPOV.

Teknika arango: Ljubomir LAZAROV
Korektisto: Jordan ČALJOVSKI
Administranto: Asen JOSIFOV

Revuo „Bulgara Esperantisto“ — fondita en 1919, distingita per ordeno „Kiril kaj Metodij“ — 1 grado. Eldonkvanto 6500 ekz.

Adreso de la redakcio:
„BULGARA ESPERANTISTO“
Bul. Ĥristo Botev 97

1303 Sofio, Bulgario

P. K. 66
1 000 Sofio

Ŝtata presejo „Georgi Dimitrov“, bul. Lenin 117

VERDAJ STELTOJ



Karaj infanoj,

Ĉu vi jam legis la bildrakontojn pri la mallaŭdindaj kaj fiaj petolaĵoj de Maks kaj Morits? En tia okazo vi certe scias, ke ilia aŭtoro estas la germana poeto kaj pentristo Wilhelm Busch (1832—1908).

„Maks kaj Morits“ aperis en 1865. La verko fariĝis mondfama, atingis eldonkvanton de pluraj milionoj kaj ĝis nun estas tradukita en 29 lingvoj.


Nun ni proponas al vi en Esperanta traduko la sesan bubajon (ĉapitron) el „Maks kaj Morits“. La tradukon faris la germana esperantisto Rudolf Fischer.

Jen ankaŭ kelkaj vortoj pri Wilhelm Busch, el la postparolo de la tradukinto: „Wilhelm Busch naskiĝis en 1832 kiel la unua el 7 gefiloj de komercisto en la vilaĝo Wiedensahl, okcidente de Hannover. Ekde lia naŭa vivojaro lin edukis lia onklo, pastro en vilaĝo Ebergötzen ĉe Göttingen. Tie Wilhelm Busch petolas kun amiko, kiu hejmas en muelejo; tio verŝajne inspiras al li rakonti la bubajojn de Maks kaj Morits.

Ekde 1847 li studas en la Teknika Altlernejo en Hannover kaj partoprenas la Germanan revolucion dum 1848. Laŭ instigo de pentristo, li decidas ŝanĝi sian fakon kaj studas pentroarton en Düsseldorf (1851), Antwerpen (1852) kaj ekde 1854 en München.


Busch estis ĉefe desegnisto kaj pentristo (ne nur de bildrakontoj) kaj verkis siajn tekstojn nur post la bildoj. Per sia kraĵono li moke atakas hipokritecon kaj etburĝecon de ĉiu speco. Pedagogoj, kritikistoj kaj potenculoj kondamnis liajn verkojn, sed la publiko ĝis hodiaŭ ŝatas la groteskecon de la situacioj kaj figuroj, kiuj aperas ĉe li kaj la majstran regadon, bilde kaj vorte, de la satira plumo, en kies raportoj ĉiu ridetante trovas ion konatan — de aliaj kaj de si mem.“

Do agrablan legadon!



¹ Wilhelm Busch. Maks kaj Morits. Knaba rakonto en sep bubajoj. Amuza, klasika, abunde ilustrita poemo por infanoj. El la germana tradukis Rudolf Fischer. Eldonisto: Deutscher Esperanto-Bund e.V., 6430 Bad Hersfeld, Lambertstr. 12, FRG, 1985. 84 p., 19 cm. Mendebla ĉe la libroservo de UEA. Koloro ilustrita. Prezo: 14,40 glđ.

MAKS KAJ MORITS SESA BUBAJO



Dum la tempo antaŭ Pask',
kiam estas pia task'
de l' bakistoj, lerte fari
sukeraĵojn kaj prepari,
Maks kaj Morits tiajn mem
volis uzi pro frandem'.
Sed la majstro jam konscie
la bakejon ŝlisis tie.
Tial devas ŝtela bubo
rampi tra l' kamenotubo.
Glit! El la kamenkapuĉo

knaboj, nigraj kiel tuĉo,
— puf! — en keston de farun'
kap-antaŭe falas nun.
Jen! Aspektas ĉiufланke
ambaŭ buboj kretoblanke.
Sed jam vidas kun plezuro
ili kukojn ĉe la muro.
Kraĵ! Rompiĝas la apog'.
Ŝmac! Akceptas ilin trog'.
Past-kovritaj ĝis la ŝu'
staras jen mizeraj du.
Tuj la majstro alrapidas
kaj la frandemulojn vidas.
Iĝas ambaŭ fi-infanoj
— unu, du kaj tri! — du panoj.
Fajro restis en bakuj' —
ŝov! — do en la fornon tuj!
Tir! El la ardaĵo nun;
jam montriĝas krusta brun'.
Ili mortis, ĉiu diras.
Ne, ankoraŭ ili spiras!
Rongas, manĝas kiel musoj
ili tra la past-burnusoj.
La bakist' kolere ruĝas:
„Dio! Tie ili fuĝas!“
Jen bubajo ses, sed kun
prompto sekvas lasta nun.